

EL POPOLO CINIO

中國新道


11

1999

**Kantu la saman
kanton**

Flugi trans la
Flavan
Riveron





Sovaĝaj ĉevaloj

de ANA MARIA IBANEZ (Argentino)

Ĉinaj esperantistoj trovis la jaron 1999 ŝajne plej intensa, ĉar en tiu jaro ili havis multajn Esperantajn kunvenojn. En julio ili partoprenis en la 84-a Univerŝala Kongreso de Esperanto, kaj, reveninte hejmlanden, iuj el ili tuj veturis al la pitoreska urbo Guilin en suda Ĉinio por la 4-a Ĉina Kongreso de Esperanto. Malgraŭ laco pro la longa vojaĝo, multaj el la partoprenantoj de la Guilin-a Kongreso senripoze hastis al Hanojo por alesti la 2-an Azian Kongreson de Esperanto. Kvankam ili estis lacaj, tamen ili sentis grandan ĝojon, ĉar ili sciis, ke tia ŝanco estis malofta. Ili opiniis, ke la skalo de tiuj kongresoj estas pli granda kaj la temoj pli signifaj. Ili ja estis ĝojaj pene laborante por tio, kaj tio certe fariĝos movforto kuraĝigi ilin daŭre labori por Esperanto. "Kantu la saman kanton" en ĉi tiu numero raportas pri la ĉina kongreso, kaj en la sekvanta numero vi legos raporton pri la 2-a Azia Kongreso.

Legantoj volas legi pri moro de ĉinoj en konstruado de domoj. "Kie oni konstruis domon?" en ĉi tiu numero konigas al vi la moron de ĉinoj en elekto de loko por konstrui domon, kaj tiu moro estas nomata "geomancio". Tiu moro malsamas ĉe diversaj nacioj kaj en diversaj lokoj, kaj la sameco estas en tio, ke ĝi estas kaj praktika kaj iom superstiĉa.

Por la homaro herezaj organizoj kaj iliaj konsekvencaj damaĝoj ne estas fremdaj, kaj Ĉinio ne estas escepto. "Falungong" menciita en ĉi tiu numero ja estas hereza organizo. Multaj ekzercantoj de Falungong deviis de la normala psiko kaj estiĝis tragedio por multaj homoj kaj familioj. La malutilo de Falungong estas terure granda. Ĝi indignigis la tutan socion kaj neniu miris, kiam ĝi estis malpermesita.

La Red.

El Popola Ĉinio

11 [494] 1999



Vestoj fasonitaj por medioprotekto
Foto de Zhao Xi


En la Ĉina Internacia Vest-foiro de 1999 estis montrata vestoserio fasonita de juna ĉina fasonisto Wang Yutao kaj temanta pri la bela ekologia medio de nordorienta Ĉinio. La vestoserio, kiu atentigas la homojn pri protekto de arbaroj, gajnis la arĝentan medalon en la foiro.

EL POPOLA ĈINIO

Monata gazeto, eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo
Redaktata de Redakcio de "El Popola Ĉinio"
Distribuata de Distribua Fako de "El Popola Ĉinio"
Direktoro: Wang Xifu
Adreso: P.O. Kesto 77, Beijing 100037, Ĉinio
Telefono kaj telefakso: +86-10-6832 1808
Retpoŝto: epc@china-report.com
Hejmpaĝo: <<http://www.china.org.cn/EIPopolaCxinio>>

ENHAVO

- 2 INTER NI
- 4 EKONOMIE:
Ŝanĝigoj en 50 jaroj (IV);
Kurantaj aferoj
- 6 Kantu la saman kanton
- 9 POR KOMENCANTOJ:
Turismaj interesajoj en Taiwan
- 10 SUR NIA LIBROBRETO:
Gemoj en la verda mondo
- 13 ESP-NOVAĴOJ
- 14 Paradizo de tigroj kaj ursoj
- 16 Flugi trans la Flavan Riveron
- 18 Vesto-foiro kaj medioprotekto
- 20 SERĈO DE SHANGRILA:
Ekspediciado en valo de Jinsha-rivero
- 24 De Schlappner al Houghton (II)
- 25 EN ĈINAJ URBETOJ:
Tamburado de Renĉiu
- 28 Vizito al Makao (IV)
- 29 Fremdlandaj folkloroj sur ĉina strato
- 32 Solida komplekso por Tibeto
- 36 ĈINA KULTURO:
Kie oni konstruis domon?
- 38 En Regno de Vaksumeo
- 40 Al kiu verŝi la koron?
- 41 KORESPONDI DEZIRAS
- 42 Pereo de herezo
- 43 Malnova presejo kaj ĝia mastro
- 46 EL ĈINAJ GAZETOJ
- 48 En la loko de Dong-nacianoj
- 50 POR VIA SANO:
Pri buŝa higieno
- 51 ĈINAJ POŝTMARKOJ:
Pitoreskejo Jiuzhaigou
- 2 FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ:
Sovaĝaj ĉevaloj
SUR LA DORSKOVRILO:
Antaŭurbo de Pekino en aŭtuno



Lokoj menciitaj en ĉi tiu numero

- 1. Taiwan (p. 9)
- 2. Guilin (p. 6)
- 3. Jixian-gubernio (p. 16)
- 4. Baokang-gubernio (p. 38)
- 5. Renĉiu (p. 25)

Ŝanĝiĝoj en 50 jaroj (IV)

de JI PING

ĈINIO estas antikva lando kun civilizacio de 5 000 jaroj. Ĝiaj sciencoj en la antikveco havis oran tempon kun epokfaraj eltrovoj de kompasoj, pulvo, paperfarado kaj presarto. Sed pro la senĉesa militado kaj aliaj kialoj, la nivelo de la sciencoj kaj tekniko de Ĉinio stagnis dum longa tempo. En 1949, kiam fondiĝis la nova Ĉinio, en la tuta lando estis nur 30 institutoj de scienca esplorado kun 50 000 sciencaj kaj teknikaj laborantoj kaj mankis moderna scienco. Sed kune kun la fondiĝo de la tute nova socia sistemo en 1949, establiĝis la Ĉina Akademio de Sciencoj. En la 50-aj jaroj Ĉinio ellaboris la unuan projekton pri scienca disvolvado "Tutlanda Perspektiva Projekto de Sciencoj kaj Tekniko en 1956-1967", kiu difinis esploradon kaj disvolvado de serio da gravaj bazaj kaj praktikaj teknologioj de transistoro, komputoro, aŭtomatiko, radio kaj nukleo. Poste iom post iom formiĝis la ĉina scienca kaj teknika sistemo, kaj tio stimulis la koncernajn industriajn departementojn kaj aliajn industriojn. Dank' al la tutlanda kunlaboro en gravaj scienc-esploraj temoj, Ĉinio akiris gravajn sukcesojn en la kampoj de nuklea tekniko, misilo kaj kosmonaŭtiko. Aprile de 1970 Ĉinio lanĉis sian unuan sputnikon, farante sin la kvina lando povanta produkti kaj lanĉi sputnikon. En la sekvaj preskaŭ 30 jaroj Ĉinio lanĉis pli ol 40 sputnikojn repreneblajn, telekomunikajn, meteologiajn kaj scienc-eksperimentajn. En 1985 Ĉinio proklamis, ke ĝi jam eniris en la internaci-

an merkaton de lanĉo de komercaj sputnikoj kaj posedis kapablon lanĉi diversajn sputnikojn al orbitoj alta, meza kaj malalta. En 1990 Ĉinio unuafoje lanĉis fremdlandan komercan sputnikon. Tio markis, ke la kosmonaŭtiko de Ĉinio enviciĝis inter la avangardaj landoj.


En la lastaj 20 jaroj Ĉinio donis pli kaj pli grandan atenton al disvolvado de sciencoj kaj tekniko, kaj dank' al tio ĝiaj sciencoj kaj tekniko tendencas al rapida disvolviĝo. Ĉinio nun havas sendependan kaj

kompletan scienc-teknikan sistemon kun ĉiuj fakoj kaj scienc-teknika trupo el dek milionoj da homoj, kaj akiris scienc-teknikajn fruktojn kun monda nivelo, kiel ekzemple akvobaraĵo sur Yangzrivero ĉe ĝiaj Tri Gorĝoj kaj komputoro "Lakta Vojo III" povanta kalkuli dek miliardojn da fojoj en sekundo.

En 1995 la ĉina registaro ellaboris la strategion "progresigi la landon per sciencoj", kies ĉefa enhavo estas: preni edukadon kiel fun-

	1949	1998
nombro de scienc-teknikaj laborantoj (dek mil)	5	262
nombro de sciencaj kaj teknikaj institutoj (dek mil)	30	19918
temoj de scienca esploro atingintaj la internacian nivelon		4700
nombro de studentoj (dek mil)	15.5	223.46
nombro de lernantoj de ordinara mezlernejoj (dek mil)	103.9	5449.73
nombro de lernantoj de elementaj lernejoj (dek mil)	2439.1	13953.80
procentaĵo de infanoj akceptantaj prope-deŭtikon	20%	98.93%

damenton; meti sciencojn, teknikon kaj edukadon sur gravan lokon de la ekonomia kaj socia disvolviĝo; pliigi la sciencan kaj teknikan povon de la lando kaj la kapablon turni sciencojn kaj teknikon en produktan forton; altigi la sciencan kaj kulturan kvaliton de la tuta nacio; turni la ekonomian konstruadon sur la trakon dependi de scienc-teknika progreso kaj altigi la kvaliton de la laboruloj por akceli prosperiĝon kaj potenciĝon de la lando.



■ Ŝipfabriko en nokto

KURANTAJ AFEROJ

● En la lastaj 20 jaroj la jara produktopovo de ŝipfarado de Ĉinio kreskis al 6 milionoj da toneloj kaj la produktokvanto de ŝipoj levigis de la 17-a al la 3-a loko en la mondo.

Ĝis la fino de 1998 la nombro de mendo de novaj ŝipoj de la mondo estis 2 635, kaj 5% el ili estis menditaj al Ĉinio.

● Novtipa rapida elektra vagonaro kun rapido de 200 km/h sukcese trapasis ekspertizon. La alterne ruĝa kaj blua vagonaro konsistas el 6 vagonoj kaj unu lokomotivo kun alterna-rekta transmisiado. Tio liveras rapidan, sekuran kaj komfortan trafikilon por rapidigo de la ĉina fervoja pasaĝera trafiko kaj por la trafika sistemo de rapidaj fervojoj en antaŭurbo de grandaj kaj mezgrandaj urboj.

● Aplikante la altebenaĵan

varmkolektan teknologion, Ĉinio akiris porindustrian petrolon en la nordo de Tibeto, kie la absoluta alteco estas 4 700 metroj. Tio finis la historion, ke Tibeto ne produktas nafton. Ĝia petrolputo estas en la plej alta loko de la mondo, kaj ĝia Lunpola-baseno fariĝis la plej alta petrolo- kaj gasohava baseno en la mondo.

● Ĝis la fino de junio de la kuranta jaro, en Ĉinio 1.46 milionoj da komputoroj estis enretigitaj kaj la nombro de uzantoj de la reto atingis 4 milionojn da homoj, kaj la reto konektiĝis kun tiu de Usono, Kanado, Aŭstralio, Britio, Germanio, Francio, Japanio kaj Koreio.

Krome la nombro de posedantoj de fiksa telefono en Ĉinio superis cent milionojn kaj la procentaĵo de posedantoj de fiksa telefono estas 9.54%.

● La ĉina registaro asignis 600 milionojn da juanoj por inviti en la venontaj 3 jaroj 300 transmarrajn eminentajn mezaĝajn kaj junajn sciencistojn al la Ĉina Akademio de Sciencoj, la plej supera institucio de scienca esplorado de Ĉinio. Ĉiu el ili ricevos du milionojn da juanoj por sia scienca esplorado. Ili partoprenos en la esplorado de temoj de ŝtata kreiva inĝenierio kun la Ĉina Akademio de Sciencoj kiel la ĉefa esplorado. La esplortemoj inkluzivos novan kaj altan agronomian teknikon, loĝantaron kaj sanprotektadon, kibernetikon kaj teknologion, fuelon, novajn materialojn kaj ilian avangardan produktadon, riĉfonton kaj medion, spacajn sciencojn kaj teknologion, fundamentan sciencojn kaj gravajn intermiksitaĵajn sciencojn.

Kantu la saman kanton

Teksto de YIN QIN
Fotoj de ZHANG YAO

LA 17-19-an de aŭgusto 1999 okazis la 4-a Ĉina Kongreso de Esperanto en la urbo Guilin de la Guangxi-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono, suda Ĉinio. La kongreson ĉeestis ĉ. 200 esperantistoj, inkl. tri samideanojn el Aŭstralio, Francio kaj Argentino.

POR LA KOMUNA AFERO

S-ino Tan Xiuzhu, prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL), prezidis la inaŭguron en la antaŭtagmezo de la 17-a. S-ro Chai Zemin, prezidanto de la ĉina societo "Amikoj de Esperanto" kaj la unua ambasadoro de Ĉinio al Usono, faris paroladon. Li diris, ke antaŭe li laboris kiel ambasadoro en Tajlando, Egiptio, Sirio kaj Usono, kaj li lernis la lingvojn de tiuj landoj, sed senrezulte. Li diris, ke Esperanto povas multe helpi diplomatojn. S-ro Yu Tao, aganta ĝenerala sekretario de ĈEL, faris raporton pri laboro de la ligo en la lastaj 4 jaroj kaj elmetis projekton por laboro en la estonteco.

La kongreson salutis per letero s-ro Yang Zhengquan, vicprezidanto de la societo "Amikoj de Esperanto", vicministro de la Informa Oficejo de la Ŝtata Konsilantaro de Ĉinio kaj estro de la Ĉina Internacia Eldona Grupo, s-ro Chen Yuan, honora prezidanto de ĈEL, kaj s-ro Kep Enderby, prezidanto de UEA. S-ro Yang Zhengquan skribis en sia letero, ke la ĉinaj esperantistoj resumu

en la kongreso ĉe la sojlo de la nova jarcento la sperton de la sukcesaj agadoj de organizoj kaj individuoj kaj pritraktu la orientiĝon de la ĉina Esperanto-movado de la unuaj ja-


ĝian prezidanton kaj s-ron Yu Tao kiel ĝian ĝeneralan sekretario.

STRATEGIO, ŜANCO KAJ DEFIO

La temo de la kongreso estis: Al la nova jarcento — la strategio, ŝanco kaj defio de la Esperanto-movado en Ĉinio. Ĝuste kiel s-ro K. Enderby skribis en sia salutletero, ĝi donos la okazon havigi viglajn diskutojn. Kaj dekelkaj samideanoj prezentis siajn opiniojn pri ĝi.

La kongresanoj opiniis:

I. La strategio de la ĉina Esperanto-movado estas "sur-baze de la enlanda movado,



Interŝanĝo

Foto de WANG HANPING

roj de la nova jarcento. S-ro K. Enderby skribis, ke la Esperanto-movado en Ĉinio ege gravas por ĉiuj esperantistoj, eĉ la tuta mondo. S-ro Chen Yuan skribis en sia letero: "En mia imago mi sidas nun inter vi. Mi dankas vin ĉiujn pro via senlaca energia laborado dum la pasintaj jaroj. Unuiĝu por la sankta afero. La tuta mondo de esperantistoj rigardas nin kaj multe esperas de ni."

NOVA KONSILANTARO

Post diskuto kaj interkonsiliĝo la kongreso nomumis 63 personojn membroj de la honora konsilantaro kaj elektis 97 personojn kiel membrojn de la nova konsilantaro, inter kiuj 23 estis elektitaj kiel membroj de la konstanta konsilantaro. Kaj krome la kongreso elektis Bakin, Chen Yuan kaj Zhang Qicheng kiel honorajn prezidantojn de ĈEL, s-inon Tan Xiuzhu kiel



vaste kontaktiĝi kun la eksterlandaj; servi per Esperanto al la reformado kaj pordomalfermo kaj la modernigo de Ĉinio; servi al la amikeco inter la diverslandaj popoloj kaj al la mondpaco". Esperanto estis ekkonata en Ĉinio antaŭ preskaŭ unu jarcento, sed la bazo estas neforta. Por garantii bonan servon, oni devas, antaŭ ĉio, akcenti la enlandan bazan konstruadon, nome starigi relative fortajn estrarojn de provincaj asocioj, kulturaj elitajn fortojn por Esperanto, tio estas la bazo por disvolvi la ĉinan Esperanto-movadon.

II. Plenforte agi por trovi monrimedojn, varbi membrojn kaj laŭeble disvolvi laboron en la kurantaj cirkonstancoj.

III. Pro la diverseco de la cirkonstancoj de la lokaj Esperantaj organizoj oni ne devas fari samajn postulojn. Oni devas iom-post-iome kaj stabile disvolvi laboron de la centra punkto al la ĉirkaŭaĵo. Unue oni devas ekzempligi kelkajn lokajn asociojn, disvolvi efikan kaj influan aktivadon kaj poste diskonigi la ekzemplojn al la ĉirkaŭaj lokoj, por

ke ĉi tiuj vigligu sian movadon.

VIGLAJ KUNSIDOJ

La kongreso havis kunsidojn por respondeculoj de lokaj E-societoj, fervojistoj-esperantistoj, Esperanta literaturo, legantoj de "La Mondo", librotago, junuloj...

La kongreso unuafoje aranĝis librotagon kaj ĝin prezidis s-ino Tan Xiuzhu. Ŝi rekomendis la Esperantan version de la romano "Ruĝdoma Songô" eldonita de la Ĉina Esperanto-Eldonejo, kies tradukinto Xie Yuming gajnis OSIEK-premion. Ŝi rekomendis ankaŭ "Hujuc kaj Esperanto" (en la ĉina lingvo) ĵus aperinta en aŭgusto. Ŝi diris, ke librotago estos regula pro-



Gaja renkontiĝo de veteranaj esperantistoj

gramero en la estontaj kongresoj.

En la kunsido de la Ĉina Junulara Esperanto-Asocio (ĈJEA) oni raportis pri la preparado de la 56-a Internacia Junulara Kongreso de Esperanto, okazonta la 5-12-an de aŭgusto 2000 en Hongkongo de Ĉinio. ĈEL kaj ĈJEA tutforte kunlaboros kun la Hongkongo-a Junulara Esperanto-Asocio cele komplete sukcesigi la kongreson. Multaj kongresanoj esprimis sian deziron partopreni la kongreson.

Lernantoj de la mezlernejo Sun Yatsen kantantaj E-kanton




LA UNUJAJ PREMIITOJ

Por levi la lingvan nivelon de la ĉinaj esperantistoj kaj akceli la ĉinan Esperanto-movadon, ĈEL kaj EPĈ interkonsiliĝis kaj decidis lanĉi Esperanto-premion ekde la Kvara Ĉina Kongreso. Finance subtenos EPĈ kaj mondonacantoj. En tiu ĉi kongreso estis disdonitaj premioj de literaturo, edukado kaj movado de Esperanto. S-ro Mao Zifu el Hunan-provinco, s-ro Liu Xiaojun de Shandong-universitato kaj la Esperanto-Asocio de Hubei-provinco estis honoritaj respektive per la tri premioj.



En la kongresejo



Kunsido

Foto de WANG HANPING

KONGRESEJO EN PITORESKEJO

Por faciligi la vojaĝon de tiuj samideanoj, kiuj devis partopreni la Duan Azian Kongreson de Esperanto en Vjetnamio, ĈEL proponis Guilin kiel gastiganton de la ĉina kongreso, kiu situas proksime de la landlimo. Ĉiufoje oni zorge elektis kongresejon. La unua kongreso de Ĉinio okazis en Kunming nomata "Printempa Urbo", kie la klimato estas bonega. La dua okazis en Tangshan, rekonstruita post la pereiga tertremo en 1976. La tria havis la belan monturbon Chongqing kiel gastiganton. Kaj la kvara estis en Guilin, kiu estas pitoreskejo kun admirindaj kavernoj kaj montoj. Nemalmultaj fremdlandaj sa-

mideanoj vizitis ĝin.

La kongreso kutime aranĝis ekskurson. La kongresanoj vizitis Lijiang-riveron, la monton "Elefanta Rostro" kaj Ludi-kavernon. Gaja interkomunikado daŭris dum la ekskurso kaj ĉiuj estis refreŝigitaj de la belaj pejzaĝoj.

ESPERANTO ESPERDONA

La inaŭguro kaj fermo de la kongreso havis kantadon de la Esperanta Koruso el lernantoj de la mezlernejo SunYatsen de Guilin. La fondintoj de la koruso estas esper-

antisto-poeto Lu Jixin kaj s-ino Wang Qiao, muzika instruistino de la lernejo. Kiam la bela voĉo de tiuj geknaboj en ruĝa ĉemizo kaj blanka pantalono ŝvebis en la kongresejo, ni sentis, ke la juna Esperanto estas esperdona kiel tiuj viglaj geknaboj. Jen la sama kanto el niaj korjoj:

*Riveroj, montoj sub ni ĵetitas for,
Jen ĉe ni karas ĉiu renkontiĝa hor',
En ĝoja tago plena de suna bril',
Man-en-mane ravu ni nin en long-parol',
Ĉiujn lingvojn sorĉe oru sun',
Blovas amikecon printemp-favor',
La sama sento donas al ni samon de vol',
La sama ĝojo al ni saman kanton el kor'.*

Yu Tao (dekstre) donas premion al Liu Xiaojun.



Turismaj interesajoj en Taiwan

de GU LIE

LA bela insulo Taiwan de Ĉinio altiras al si multajn turistojn. Iun someron mi havis la ŝancon viziti ĝin kaj spertis multajn interesajn aferojn. Jen kelkaj el ili.

I

Homoj havas naturbezonojn kaj la loko estas nomata diversmaniere. Sur la ĉeftero de Ĉinio oni nomas tian lokon komuna necesejo, kaj en Hongkong — manlavejo.

Foje en Taiwan mi demandis sur strato preteriranton pri necesejo. Unue li silentis momenton ŝajne surprizite, kaj poste li montris al mi la direkton. Sed kiam mi atingis la lokon, mi legis sur la pordo "Beligejon por Viroj".

II

La unua loko en mia itinero estis Gaoxiong. Mi enloĝiĝis en hotelo kaj malŝarĝis min je la valizo por ripozeto. Sed kiam mi levis la kapon, subite en miajn okulojn en-saltis sange ruĝaj vortoj: "Urĝa elirejo je aeratako!"

Mi neniam spertis militon kaj tiaj vortoj konsternis min. Feliĉe mi ne renkontis aeratakon dum la tuta semajno en Taiwan, sed mi televidis, ke morto okazis dum ekzercado de artileria trupo.

III

Ambaŭflanke de strato estis butikoj unu tuj apud alia, kaj oferta krio daŭradis senhalte. Rigardante de malproksime, mi vidis, ke multaj butikoj havas antaŭ sia pordo girlandojn, kiujn mi vidis nur en sepultejo. Mi falis en grandan miron.


Kaj oni respondis al mi, ke en Taiwan, ĉu por gratuli, ĉu por funebri, oni donacas samformajn girlandojn, kaj la diferencoj estas

en tio, ke girlando por gratulo havas rubandojn el ruĝa papero kun ora skribo, kaj tiu por funebro — rubandojn el blanka papero kun nigra skribo. Do, atentu, nepre ne misdonaĉu!

IV

Taiwan-anoj ŝatas maĉi arekonukson. En la sudo de Taiwan abundas arekonuksoj, kaj ĉe la stratoj viciĝas multaj butikoj de arekonuksoj. Mi pensis, ke la komerco certe malfacilas pro multaj tiaj butikoj.

Sed lokano diris al mi, ke viroj plej ŝatas maĉi arekonukson. Do la butikoj dungis tre viglajn junulinojn ĉarme vestitajn. Ju pli belaj estas la kelnerinoj, des pli vigla estas la komerco, kaj la butikoj ĉiam estas saturitaj de gaja atmosfero.



Strato de Taiwan

V

En Ali-montaro abundas arbaroj kaj plejparto de la ĉerkoj bezonataj en Taiwan estas faritaj en la loko. Ĉe la piedo de la montaro sidas la urbo Jiayi, kie kuŝas ĉerko-strato borderita de butikoj, kiuj vendas ĉerkojn ekskluzive. Pro multeco de la butikoj, la komerco estas malfacila. Iu el la butikoj elpensis ideon: Ĝi instalas sur la tegmento megafonon kaj senĉese disaŭdigas la saman kanton "Finfine mi ĝisatendos vin".

Baldaŭ la tuta insulo informiĝis pri la afero, kaj neniu volis plu kanti la kanton, malgraŭ ke ĝi estis fama kanto vaste konata. ■

ABONKOTIZO DE EL POPOLA ĈINIO POR 2000

Lando	Valuto	Abonprezo	Sendokosto	Pagenda sumo
Aŭstralio	AUD	19	24	43
Brazilo	USD	12	6	18
Bulgario	USD	10	6	16
Britio	GBP	10	12	22
Eŭro-landoj	EUR	12.80	16	28.80
Francio	FRF	84	108	192
Germanio	DEM	24	32	56
Italio	ITL	24000	30800	54800
Japanio	JPY	1700	2160	3860
Nederlando	NLG	28	35	63
Usono	USD	14	18	32
Vjetnamio	USD	10	6	16

1. Ĉiuj evoluantaj landoj ne menciitaj supre pagu kiel Usono aŭ Nederlando.

2. Meksikio, Singapuro kaj ĉiuj landoj en Latin-Ameriko pagu kiel Brazilo; ankaŭ Hongkong pagu kiel Brazilo.

3. Ĉiuj landoj en Azio, Afriko, Orienta Eŭropo kaj la Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj ne menciitaj supre pagu kiel Bulgario.

4. La 11 EU-landoj kun eŭro kiel komuna mono povas pagi ankaŭ kiel Eŭro-landoj.

Por aera sendo bonvolu nepre aldoni 18 USD aŭ valoron egalan al la pagenda sumo.


GEMOJ EN LA VERDA MONDO

de SHI CHENGTAI

GASTON Waringhien iam skribis, ke “unu — eble la precipa — rolo de la Esperanta literaturo estas fariĝi kvazaŭ la muzeo de ĉiuj naciaj ĉefverkoj.”¹ Tia “muzeo” liveras la kompetentecon de la lingvo Esperanto, kiel perilo de la “mondokulturo” laŭ E. De Zilah.² Ĉinaj samideanoj ĉiam klopodas por la prospero de la Esperanta kulturo, metas senĉese en tiun muzeon “ĉefverkojn” el la ĉina literaturo en la Esperanta versio kaj dezire faras tiun muzeon pli brilante bunta per gemoj, kiuj estas kristalaĵo de la longhistoria ĉina civilizacio. Jen post la eldonado de la monumenta ĉefverko en la ĉina literaturo “Ruĝdoma Songo” en tri volumoj la Ĉina Esperanto-Eldonejo eldonis “Noveloj el Antikva Ĉinio” kun 544 paĝoj.

Samkiel la ĉina poezio, ankaŭ noveloj estas trezoro en la ĉina literaturo, kaj ties verkado komenciĝis almenaŭ de Han-dinastio (206 a.K. — 220 p.K.) kaj havas historion de ĉ. 2 000 jaroj kaj fruktdonan rezulton. “Noveloj el Antikva Ĉinio” antologie prezentas al la verda mondo gemojn de la ĉina novela verkado.

Ĝia unua peco estas anekdoto pri kronprinco Dan de Yan-regno dum la periodo de Militantaj Regnoj (475-221 a.K.), kaj en la sekvaj pecoj aŭtoroj rakontis anekdotojn de Wudi, imperiestro de Han-dinastio kaj Bianque, fama kuracisto en la periodo de Militantaj Regnoj. Dum la dinastioj Wei (220-265) kaj Jin (265-420) aperis noveloj pri anekdotoj de famuloj, strangaĵoj, fantomoj kaj spiritoj, el kiuj la plej influaj estis “Registroj



de Spiritoj” de Gan Bao (?-336) kaj “Snobaj Diroj” de Liu Yiqing (403-444). En ĉi novel-kolekto troviĝas kelkaj pecoj el tiuj du libroj, en kiuj la aŭtoroj priantis neŝanceblan amon de ges-roj Han, reliefigis spadoforĝiston Ganjiang Moye, kuraĝan knabinon Li Ji kaj iaman barbaran junulon Zhou Chu, kiu klopodis fari bonon post ol penti pri sia peko, kaj rakontis nekutiman amhistorion de pudrovenda knabino...

Dum Tang-dinastio (618-907) la ĉinaj noveloj spertis grandan ŝanĝiĝon kaj prosperon, aperis “legenda novelo” kaj fikciaj verkoj, kiel Lusin (1881-1936) trafe montris: “Same kiel poezio, ankaŭ la kreado de noveloj ekhavis ŝanĝiĝon en Tang-dinastio.” Tia ŝanĝiĝo okazis precipe en du flankoj: plivastigo de enhavo, kiu toleris pli vastajn temojn; kaj pliriĉiĝon de priskriboj, kiu faris novelon kun reliefigita(j) figuro(j) kaj atentokapta intrigo. Novelo, kiel speco el la beletra kreado, jam forme maturiĝis. En ĉi novel-kolekto la noveloj “La Amo de F-ino Cui Yingying”, “Jadeta” kaj “Honordamo

S-ino Li Wa” estas la tri plej famaj amrakontoj kaj ŝatataj de ĉinoj de ĉiuj generacioj, eĉ hodiaŭ teatraj adaptaĵoj faritaj laŭ tiuj vivas sur scenoj de diversaj operspecoj. Rakontoj pri kavalireca junulino Hongxian, pri homo kun krispa vangbarbo kaj pri aliaj tute vivas inter la nunaj legantoj...

Dum Song-dinastio (960-1279) troviĝis pli multe da noveloj, eĉ profesiuloj, nome “rakontistoj”, kiuj, vagante de vilaĝo al vilaĝo, rakontis al homoj historiojn laŭ noveloj. En ĉi novel-kolekto troviĝas la teksto de tia rakontlibro kiel “Misekzekuto de Cui Ning”. “Anekdotaj Biografio de Li Shishi” estas amrakonto inter ĉarma hetajro Li Shishi kaj imperiestro... Li Fang (925-996), literatoro en Song-dinastio, kompilis la novel-kolekton “Tai Ping Guang Ji”, kun 500 volumoj, kiuj konservas grandnombrajn novelojn kaj legendojn el 475 libroj ekde Han- ĝis Song-dinastio.

Ming-dinastio (1368-1644) estis periodo de disflorado de romanoj kaj noveloj. Elstara verkisto Feng Menglong (1574-1646) kompilis kaj reverkis entute 120 novelojn, kiuj estis eldonitaj en tri volumoj, kaj Feng fariĝis fama populara novelisto, eĉ hodiaŭ liaj novelaroj ankoraŭ estas debitaj en diverslokaj librejoj. En ĉi novel-kolekto la noveloj de Feng okupas pli multajn paĝojn, de p. 249 ĝis p. 452. Li atentis la socian vivon de sia epoko kaj turnis sian atenton sur simplajn popolanojn. En la novelo “F-ino Du la Deko” li rakontis tragedian amhistorion de bela kaj bonkora hetajro Du la deka kaj en la novelo “Olevendisto kaj Ĉefbelulino” li rakontis amhistorion inter hetajro Ĉefbelulino kaj junulo Olevendisto, kiu tamen havis komedian finalon. En liaj noveloj brilas la homeca elvekiĝo.

Dum Qing-dinastio (1644-1911) novela verkado de la antikva Ĉinio kulminis sub plumo de Pu Songling, kies novelaron “Mirrakontoj de Liaozhai” (kun la elek-

titaj ĉ. 30 noveloj) jam eldonis la Ĉina Esperanto-Eldonejo (1994). En ĉi novel-kolekto troviĝas nur liaj du noveloj "Ridemulino Yingning" kaj "S-ro Xi Fangping"... La enkonduko de prof. Duan Qiming koncize priskribas evoluadon de noveloj el la antikva Ĉinio kaj helpas legantojn pli bone koni la novelojn en ĉi novel-kolekto, kaj mi ne babilu plu.

Kvankam en ĉi novel-kolekto la tradukoj esperantigitaj de diversaj ĉinaj samideanoj havas proprajn

lingvostilojn, tamen la tradukintoj tute deziris fidele reaperigi la originalojn enhave kaj forme, eĉ provis esprimi pli verve ĉinecon de la originaloj per Esperanto, kiu multe diferencas de la ĉina lingvo, celante enverŝi ekzotikan sangon el la orienta civilizacio en la Esperantan kulturon, ĉar "por ke lingvo nomiĝu tutmonda, ne sufiĉas ĝin nomi tia" (L.L. Zamenhof). Por faciligi komprenon de legantoj la tradukintoj metis en la libron necesajn klarigojn pri ĉinaj aperaĵoj,

propraj nomoj, klasikaj aludoj k.a. kaj notojn de la aŭtoroj.

Kiel aliaj eldonaĵoj de la Ĉina Esperanto-Eldonejo, "Noveloj el Antikva Ĉinio" estis bone presita, delikate bindita, ties presprovaĵo estis zorge korektita, la ĉinstilaj ilustraĵoj eble delicos vin dum legado... do, la libro certe meritas vian legadon kaj pli bone konigas al vi la ĉinan kulturen tradicion. ■

1. Vd. G. Waringhien: Beletro, Sed ne el Katedro, p. 147, FEL, 1987

2. Vd. E. De Zilah: Aliro al Ĉineco, La Gazeto, n-ro 80, p. 3

Por pli bone koni Ĉinion, bonvolu legi Ĉinio Hodiaŭ

La revuo *Ĉinio Hodiaŭ*, fondita en 1952 de Song Qingling, iama honora prezidanto de la Ĉina Popola Respubliko, eldonata en la lingvoj angla, franca, hispana, germana, araba, ĉina-brajla kaj angla-brajla, kaj distribuata en pli ol 150 landoj kaj regionoj.

Ĉinio Hodiaŭ estas ŝatataj de legantoj pro siaj interesaj artikoloj kaj belaj bildoj.

Ĉinio Hodiaŭ raportas pri la ekonomio, politiko, kulturo kaj popola vivo de Ĉinio kaj ankaŭ pri la amikeco inter la popoloj de Ĉinio kaj aliaj landoj.

Ĉinio Hodiaŭ havas tradiciajn rubrikojn, kia "Ĉinlingva Kurso", kiu ludas gravan rolon en instruado de la ĉina lingvo kaj lernado de aliaj lingvoj. Ekde 1999 tiu rubriko donas tekston en la ĉina kaj angla lingvoj, por ke la legantoj bone lernu ambaŭ lingvojn.

Ekde la unua numero de 2000 la ĉina kaj angla eldonoj estos tute kolore presitaj, kaj la revuo starigos novajn rubrikojn kaj aperigos pli da interesaj artikoloj.

La registrita poŝta kodo de la franca eldono: 2-927, tiu de la hispana: 2-926, kaj tiu de la germana: 2-943

Prezo: 3.20 juanoj por unu ekzemplero kaj 38.4 juanoj por jarabono de ajna supre menciita eldono.

La registrita poŝta kodo de la ĉina eldono (16-folia formato grandigita): 2-918

Prezo: 10.00 juanoj por unu ekzemplero kaj 120.00 juanoj por jarabono.

La registrita poŝta kodo de la angla eldono: 2-919

Prezo: 7.00 juanoj por unu ekzemplero kaj 84.00 juanoj por jarabono.

● Mendu ĉe: Waiwenqikan

Ke de la Internacia Libro-komerca Kompanio de Ĉinio, Chengongzhuang Xilu, Nr. 35, Beijing, 100044, Ĉinio. Tel: +86-10-68420340 Telefakso: +86-10-68412023

● Ĉinaj legantoj mendu ĉe sialoka poŝtofiĉejo.

La redakcio de *Ĉinio Hodiaŭ* mem respondecas pri distribuado de ekzempleroj de la araba eldono, kaj prezo de ĉiu ekzemplero estas 5.00 juanoj kaj 60.00 juanoj por jarabono.

● Al la distribua sekcio de la redakcio de *Ĉinio Hodiaŭ* estas bonvena ankaŭ mendo ekde ajna numero kaj ajna jaro, kaj la sekcio ne postulas sendokoston, krom tiu de aerpoŝto. Skribu al la sekcio preslitere. Adr.: Redakcio de *Ĉinio Hodiaŭ*, Baiwanzhuang Lu, Nr. 24, Beijing, 100037, Ĉinio. Tel: +86-10-68326089 Telefakso: +86-10-68328338

Ekzempleroj de *Ĉinio Hodiaŭ*



La deka konkurso de EPCĈ-legado

“El Popola Ĉinio” travivis preskaŭ duonjarcenton. Antaŭ dek jaroj, kiam ĝi jubileis sian 40-jariĝon, ni komencis la konkurson de EPCĈ-legado, kaj ĝi okazas unu fojon ĉiujare. Inter la partoprenantoj estis novaj kaj malnovaj legantoj. La memoraĵoj por la gajnintoj estis modestaj, sed niaj legantoj fervore partoprenis en la konkurso kaj iuj el ili partoprenis en sinsekvaj jaroj. Tio multe kuraĝigis nin. Dank’ al la konkurso ni havis pli intimajn interrilatojn kun niaj legantoj.

La ĉi-foja konkurso donas dek demandojn. La solvoj estas troveblaj en la numeroj de 1999. Lakonaj respondoj estas dezirataj.

1. En 1933 brita romanisto James Hilton menciis “Shangrila” en sia romano “La Perdita Horizonte”, kie estas neĝmontoj, belaj temploj, viglaj urbetoj... Nun la demando estas: Kie troviĝas Shangrila en Ĉinio?

2. Multaj ŝanĝiĝoj okazis al Ĉinio en la lastaj 50 jaroj. Kiu ŝanĝiĝo estas la plej okulfrapa laŭ vi?

3. Kie Ĉinio unue praktikis la politikon “Unu lando, du sistemoj”? Kaj ankaŭ kie Ĉinio praktikos tiun politikon?

4. “Masoni la Grandan Mu-

ron” aludas popularan ĉinan ludon, kiun la Ĉina Komisiono de Korpokulturo kaj Sportoj enlistigis ĝin kiel sportobranĉon. Kiel nomiĝas la ludo?

5. Unu el la nacimalplimultoj de Ĉinio, nomata nacio de la maro, loĝas sur insuloj kaj vivtenas sin ĉefe per fiŝado sur maro. Kiel ĝi nomiĝas?

6. Kiuj estas la ĉefaj religioj en Ĉinio?

7. Kiaj diferencoj troviĝas en la strukturo kaj materialoj de la tradicia arkitekturo de Ĉinio kaj tiu de Eŭropo?

8. Post esplorado scienlistoj asertis, ke la plej granda kanjono de la mondo troviĝas en Tibeto de Ĉinio. Ĝia longo estas 496.3 kilometroj, kaj la meznombraprofundo de la ĉefa parto de la rivero estas 5 000 metroj. Kiel nomiĝas la kanjono?

9. Kiom da alilandaj studentoj nun lernas en Ĉinio?

10. En aŭgusto 1999 la ĉinaj esperantistoj havis tri gravajn en- kaj eksterlandajn kongresojn de Esperanto. Kiuj ili estis?

En majo 2000 EPCĈ jubileos la 50-an datrevenon de sia fondiĝo. Pro tio ni aldonas 5 demandojn kaj elektos 10-20 elstarajn el la res-

pondantoj. La demandoj estas jene:

1. Kiam vi komencis legi EPCĈ? Ĉu ĝi iam helpis vin?

2. Kiom da konkursoj de EPCĈ-legado vi partoprenis? Ĉu vi estis premiita?

3. Kian aspekton kaj kian temon de nia revuo vi preferas?

4. Kiel Ĉinio kaj ĝia popolo impresis vin, antaŭ ol vi legis EPCĈ? Ĉu ŝanĝiĝis via impreso post via legado de EPCĈ?

5. En kiu jaro fondiĝis la Ĉina Popola Respubliko? Kaj en kiu jaro Ĉinio komencis reformadon kaj pordomalfermon?

Skribu sur papero viajn respondojn kun n-roj de la demandoj kaj sendu ĝin antaŭ la 15-a de januaro 2000 al s-ro Wang Hanping, El Popola Ĉinio, P. O. Kesto 77, CN-100037 Beijing, Ĉinio. La ĝustajn respondojn ni publikigos en n-ro 5 de la venonta jaro. La gajnintoj ricevos unu el la jenaj memoraĵoj: I. Donaco de unujaraj ekzempleroj de EPCĈ; II. Nova libro en Esperanto eldonita en Ĉinio; III. Ĉinaj poŝtmarkoj; IV. Malgranda metiartaĵo. Bonvolu skribi en via respondo ankaŭ, laŭvice, la n-rojn de via preferata memoraĵo.

ĈINIO

● En la Dua Konkurso de Fremdlingva Konversacio okazigita de la departemento de profesia eduko la 17-an de junio en la urbo Wafangdian, Liaoning-provinco, tri esperantistoj el la Materiala Profesia Mezlernejo de la urbo prezentis Esperantan unuaktan teatraĵon "Por paco, kontraŭ milito". (Wang Yun)

● En la unua duonjaro de 1999 Dalian-universitato funkciigis nedevigan E-kurson gvidatan de vicprofesoro Wang Tailin, vicdekano de la fremdlingva fakultato de la universitato. 32 studentoj lernis en ĝi.

BELGIO

● "Esperanto sen mitoj", aŭtoro: Ziko Marcus Sikosek. Subtitolo: Mensogoj kaj memtrompoj en la Esperanto-informado. Dokumenta libro kun esenca materialo por bona informado pri Esperanto. Pragmate verkita, sen preteratenti la historian dimension, kun abundaj referencoj al fontomaterialo (kiu facile retroveblas en ampleksa bibliografio) kaj indekso de nomoj kaj terminoj. 312 paĝoj A5. La verko estas aĉetebla ĉe Flandra Esperanto-Ligo <butiko@fel.agoranet.be>, UEA kaj aliaj gravaj libroservoj kontraŭ 22.50 euroj + afranko. (Flandra Esperanto-Ligo)

ĈEĤIO

● La 51-a Kongreso de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio okazis en la tagoj 8-15.05.1999 en Le Mans, kun 285 partoprenantoj el 21 landoj. La

ĉefa kongresa prelego de Georges Wallerand temas pri "La Fervojo kaj la Entrepreno-Komitatoj". Okaze de la kongreso aperis "IFEF-historio Kompletiga Suplemento pri la jaroj 1984-1999". La venonta 52-a IFEF-Kongreso okazos en la tagoj 13-19.05.2000 en Budapeŝto, Hungario.

(Jindrich Tomisek)

lio la fondinto kaj prezidantino de la Fondaĵo prof. Joy Beaudette Cripps: "...Jam de kelkaj jaroj la Fondaĵo sekvas la progreson de la Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro kaj volas konigi al la homoj de la tuta mondo la laboron de la muzeo fondita en Samarkando laŭ iniciato de membroj de la Klubo de Interpopola Amikeco 'Esperanto' honore al la Internacia Jaro de Paco."

● Sub la titolo "Esperanto Halkaro Tili" ("Internacia Lingvo Esperanto") aperis la unua uzbeklingva E-studlibro. Tiun ĉi ĉ. 230-paĝan libron aŭtoris samarkandaj esperantistoj Anatoli Ionesov, direktoro de la Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro, kaj Bahodir Habibov, profesia lingvoinstruisto. La libro enhavas 12-lecionan E-gramatikon, Esperanto-Uzbekan kaj Uzbekan-Esperantan Vortaretojn kaj Uzbekan-Esperantan Konversacilibron. Krom tio estas ankaŭ kurta esperantlingva priskribo de la uzbeklingvo, ties gramatiko kaj prononc-reguloj, kio faras la libron interesa kaj praktike uzbla ankaŭ por alilandaj esperantistoj, kiuj interesiĝas pri la uzbeklingvo, samkiel por vojaĝantoj al Uz-



Prof. Peter Pavuk el Slovakio 80-foje partoprenis maratonan konkurson okazintan en diversaj lokoj de la mondo, propagandante Esperanton kaj E-movadon. En la venonta jaro li partoprenos en la maratona konkurso en Romo, la unua en la nova jarcento.

UZBEKISTANO

● Fine de 1998 la Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro en Samarkando estis distingita per la honormedaliono "Ora Kolombo en Paco" de la Aŭstralia Fondaĵo Poezia Tago. Kiel skribas en la tiutema honorfo-

bukistano. La libro aperis ĉe Moskva E-eldonejo "Impeto" dank' al afabla subteno de la Eduka Fondaĵo Carson kaj estas dediĉita al la Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro, kies naskiĝo okazis en Samarkando antaŭ ĉio dank' al Esperanto.

de WANG HANPING

EN la nuna jarcento la homoj tro multe ekspluatis arbarojn kaj ege malpliigis la vivspacojn de tigroj, kaj plie, dum longa tempo oni arbitre ĉasis ilin. Ĉio ĉi kaŭzis rapidan malpliigon de tigroj. Nun en la tuta mondo vivas nur ĉ. 3 mil tigroj. Ni prenu la sudĉiniajn tigrojn kiel ekzemplon. En la 50-aj jaroj ilia nombro estis granda, sed laŭ enketo farita antaŭ kelkaj jaroj, restis nur 20 sovaĝaj sudĉiniaj tigroj, se kune kun la samspeciaj tigroj vivantaj en diversaj zooj, ilia totala nombro ne superas 80. El tio vidiĝas, ke la tigroj

estas pereontaj.

Por protekti la tigrojn kaj aliajn rarajn bestojn s-ro Zhou Weisen, prezidanto de la kompanio (grupo) Xionsen, Hongkong, fondis Vilaon de Tigroj kaj Ursoj en sia hejmloko, Nanping, Guangxi-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono, en 1993. Ekde ĝia fondiĝo la Ŝtata Forsta Buroo donas al ĝi grandan helpon kaj donacis al ĝi 19 tigrojn, kiuj naskis en la sekvantaj 4 jaroj 73 tigridojn, el kiuj nun vivas 62.

Komence de 1997 la vilao, multe helpata de la forstaj departementoj de la Guangxi-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono kaj tiu de la centra registaro, translokiĝis en la pitoreskan ĉirkaŭurbon

de Guilin kaj poste fondiĝis bazo de scienca esplorado kaj produktado de felisoj sub la Guangxi-a Centro por Savi Pereontajn Rarajn Bestojn. En unu jaro kaj duono ĝi reproduktis 42 tigrojn kaj 70 ursojn. Post 2 jaroj la Internacia Best-ama Fonduso kaj Internacia Asocio por Protekti Sovagajn Bestojn ekspertizis la vilaon, kovranta pli ol 500 000 kvadratajn metrojn, kiel la plej grandan bazon en la mondo por scienca esplorado, generado, sovaĝigo kaj rigardado de tigroj kaj brunaj ursoj.

En la vilao nun estas 4 subspecioj da tigroj, t.e. nordorientĉiniaj tigroj (siberiaj tigroj), sudĉiniaj tigroj, bengalaj tigroj

PARADIZO DE TIGROJ KAJ URSOJ

Sudĉinia tigo





Blanka tigro

kaj blankaj tigroj el Usono. Nun tie vivas jam entute 130 tigroj. En la vivejo de tigroj estas akuŝejo, sovaĝigejo kaj multaj kaĝoj. Ĉirkaŭe estas gazono kun areo de 60 000 kvadrataj metroj, kie la tigroj povas libere moviĝi, dume la homoj iras ekskluzive en la koridoro ŝirmita de kradoj.

La aliaj grandaj bestoj en la vilao estas brunaj ursoj. Nun tie vivas 300 ursoj. Tie estas akuŝejo de ursoj kaj ekologiaj lokoj 48 mil kvadratajn metrojn vastaj. La brunaj ursoj, stultetaj kaj amindaj, povas kapti pomojn de sur hokstangoj enetenditaj de turistoj ekster la krado. Krome, tie vivas ankaŭ leonoj, leopardoj, serpentoj, simioj, birdoj kaj aliaj protektataj raraj bestoj.

Por efike protekti kaj generi la rarajn sovaĝajn bestojn, la vilao dungis aron da fakuloj. Pro rapida kresko de la nombroj de

tigroj kaj ursoj kaj por preventi la sangmiksiĝon kaj malsanojn, en 1998 la vilao kaj du famaj institutoj starigis scienc-esplorajn rilatojn. Ĝi petas

Brunaj ursoj



profesorojn fari la urĝe bezonatan sciencan esploron. Nun la vilao estas scienc-esplora bazo de la Nordorienta Forsta Universitato en studo de sovaĝaj bestoj. Dank' al penado de la fakuloj kaj vilaaj laborantoj ĝi jam havas volumon da scienc-esploraj dokumentoj. Tie oni sukcese kuracas tigran anemion kaj faris cezaran operacion por sudĉiniaj tigroj, kio vekis publikan atenton. Tie starigis ankaŭ DNA-banko de tigroj. Kunlabore kun la Nordorienta Forsta Universitato kaj la Ŝtata Forsta Buroo la vilao faris genealogion de DNA-nivelo de tigroj kaj metis bazon por gena geneologio de diversaj subspecioj de tigroj.

Laŭ rapideco de tigra produktado la nombro de tigroj atingos 500 en la 2000-a jaro kaj 1 000 en la 2005-a. Oni sovaĝigos la

tigrojn cele rehavigi al ili la naturan sovaĝecon. Se estos taŭga natura medio, la vilao efektiviĝos sian planon, t.e. forlasi ilin en la naturon. ■



de PANG BIAN

NAŭ minutojn antaŭ la 12-a horo de la 20-a de junio 1999 juna kamparano Zhu Zhaohui per motorciklo sukcese flugis trans la danĝeran naturan barajon. Li flugis pli ol 40 metrojn en la aero kaj sekure surteriĝis. En tiu momento ektondris aplaŭdoj de la rigardantoj. Oni ĵetis lin supren...

“ANKAŬ MI FLUGOS!”

La Flava Rivero torentas orienten kaj, kiam ĝi atingas Jixian-gubernion en sia meza baseno, enpremiĝas en la rivervojon 30 m larĝan kaj ĉe la klifo falas malsupren pli ol 40 metrojn, tial la akvo falas kiel verŝata kun animskua tondro. Ĝi estas nomata Akvofalo Hukou, kiu estas la plej mallarĝa kaj plej danĝera loko de la Flava Rivero.

Antaŭ 24 jaroj Zhu Zhaohui naskiĝis en kamparana familio ĉe la akvofalo. Li kreskis nutrate de la Flava Rivero. Li estas junulo mezastatura kaj sunbruna kun paro da brilaj okuloj.

En sia infaneco li estis petolema kaj en la aĝo de 11 jaroj li pruntis motorciklon por distriĝo kaj forte enamiĝis en ĝin. Foje, kiam li aĝis 13 jarojn, li veturigis aŭton pli ol

100 kilometrojn por sperti la ĝojon de ŝoforo. Poste li lernis manipuli traktoron, kamionon, ĵipon... kaj ne volis daŭrigi sian lernadon. Antaŭ la fakto lia patro konsentis, ke li sin okupu je transportado. De la transportado li kvankam enspezis malmulte, tamen lia ŝoforado fariĝis pli kaj pli elstara.

En 1992 la Azia Flughomo Ke Shouliang motorcikle flugis trans la Grandan Muron, kio vekis grandan admiron ĉe Zhu. La 1-an de junio, 1997, Ke per aŭtomobilo flugis trans la akvofalon Hukou. Tiam Zhu ekscitiĝis, pensante: “Mi estas filo de la Flava Rivero. Ankaŭ mi flugos trans ĝin!”

“MI NE BEDAŬROS”

Ordinaraj homoj pensas, ke maŝine flugi trans la Flavan Riveron estas nenio alia ol ŝerci kun sia vivo. Sen financa subteno kaj fajna ekipaĵo, li neniam estis rigore trejnita en tiu tekniko. Li estas nur ordinara knabo kreskinta ĉe la Flava Rivero. Tamen li estas homo denaske simpla kaj honesta kiel la Leŭsa Altebenaĵo kaj nefleksebla kiel la torenta Flava Rivero. Bone kantas la lokanoj: “La montoj nutras nin kiel montojn, la riveroj nutras nin kiel riverojn.” Dank’ al tio li kuregis per malnova motor-

ciklo sur la sulkoplana kampo. Li konstruis por si mem terason unu metron altan kaj 2 metrojn longan kaj la 5-an de februaro, 1998, li forte premis la gaspedalon, sed ho ve, ekster lia atendo la motorciklo sin ĵetis en aeron pli altan ol domo. Li haste ĉirkaŭprenis sian kapon per la du manoj. La veturilo forlasis lin kaj li falis peze. Liaj pantalonoj komplete disŝiriĝis. Oni transportis lin hejmen per brankardo. Sed en la kvara tago li ne povis plu resti hejme, ĉar li promesis al la samvilaĝanoj, ke en la 11-a de la sama monato li prezentos la flugadon. Eltenante akran doloron, li refoje kondukis la motorciklon. Post 2 tagoj li sukcese flugis 8 metrojn.

Por ekzerci sin je la flugado li “mortis” 3-foje. Li svenis de falo surstrate. Por ekzerci sin je la drasta ĝirado de 360 gradoj li tute perdis la konscion kaj duonmonaton antaŭ la oficiala flugo trans la Flavan Riveron li provis la motorciklon sur la kurejo ĉe Hukou kaj peze falis. Li ne rekonsciiĝis sur la vojo de 40 km al la hospitalo. Oni kun maltrankvilo diris: “Eble li ne flugos. Li suferas de cerba komocio kaj ne povas klare vidi eĉ la kurejon.” Sed nia brava junulo Zhu estas homo el ŝtalo, post 4 tagoj li denove aperis sur la kurejo en



Hukou.

Lia pliaĝa fratino admonis, ke li ne risku sian vivon. Lia frato ameme demandis: "Kiom da vivoj vi havas? Kial vi faras tian danĝeraĵon?" Zhu Zhaohui silentis. Li prenis la kaskon kaj forlasis ilin. La frato petis la patron: "Paĉjo, vi ja bone scias la danĝeron. Ne permesu lian flugon!" La bonkora patro respondis: "Li jam plenkreskis. Lasu lin fari tion, kion li volas."

Efektive, la patro ege maltrankvilis pro sia filo. Li bone scias, ke neniu sukcesos malhelpi lin en tio, kion li ŝatas.

LA POPOLO SUBTENAS LIN

La patro vendis siajn du aŭtojn kaj pruntis 20 mil juanojn. Per tiu monsumo li aĉetis por sia filo malnovan motorciklon. Por la sekureco la maljunulo persone konstruis vojton, ebenigis sulkojn sur la kampo. Li diris: "Mi subtenas la filon por ke li gajnu honoron por la loĝantoj ĉe la Flava Rivero."

Flugi trans la Flavan Riveron estas afero ne sole de Zhu sola kaj lia familio. La gubernia registaro decidis "armi" la bravan junulon. Iu entreprenisto el kamparano elspezis milionon da juanoj por pre-

tigi la kurejon. Ankaŭ la frato de Zhu Zhaohui estis emociita kaj aĉetis poŝtelefonon kaj donacis ĝin al li.

Flugi trans la flavan Riveron vekis atenton ankaŭ de aliaj flankoj ekster lia gubernio. Informiĝinte pri la decido de Zhu, la Ĉina Motorcikla Teamo decidis helpi lin. Ĉeftrejnistoj de la motorciklistoj s-ro Qin Kening diris al Zhu: "Flugi trans la Flavan Riveron estas mia revo dum multaj jaroj. Mi helpos vin laŭ mia povo." S-ro Qin opinias, ke Zhu kvankam ne studis tiun fakon, tamen estas sprita kaj eĉ mania pri ekzercado de la aerobatikado. Li persone venis al Hukou kaj sin okupis je trejnado de Zhu. Dank' al sia diligenteco en malpli ol 2 jaroj Zhu ellernis multe da malfacilegaj akrobataĵoj, iujn el ili timis eĉ profesiaj motorciklistoj. Qin estis aparte ĝoja, ĉar Zhu estas anime forta, multimema kaj elmontriĝema. Li fariĝis fidoplena por Zhu.

Ankaŭ Zhu estis optimisma kaj memfida. Li diris: "Tio estas mia kariero. Mi devas penadi la tutan vivon kaj esti viro ne vaniganta la esperon de la loĝantoj ĉe la Flava Rivero!"

"MI EDZIĜOS AL VI SENDUBE!"


Antaŭvespere de la flugo trans la Flavan Riveron, je la deka kaj duono, Zhu vizitis sian fianĉinon Caili. Ili silente rigardis unu la alian plurajn minutojn kaj fine la junulo diris: "Estu trankvila. Mi sukcesos kaj post tio edziĝos al vi sendube." Ili decidis, ke post la transflugo ili tuj okazigos la nupton sur la bordo de la rivero.

Caili estas bela knabino kaj samgu-

berniano de Zhu. Ŝia frato funkciigas riparejon de maŝinmovaj veturiloj en la gubernia urbo. Zhu Zhaohui ofte iris tien por riparigi la motorciklon kaj pro tio konatiĝis kun Caili. Ili enamiĝis unu en la alian kaj gefianĉiĝis.

Tiutage en neĝblanka gazrobo Caili staris sur la transa bordo de la Flava Rivero. En granda maltrankvilo ŝi atendis la duoblan ĝojon. Jen batis la 11-a horo. Ŝi fariĝis maltrankvila kaj murmuris: "Vento tro forta, vento tro forta..." Subite aŭdiĝis la zumado de la motorciklo trans la rivero kaj la novedzino laŭte ploris, sed post momento ŝi jam estis forte ĉirkaŭpremata de la sukceso fluginta edzo. La apudestantoj ekfrapis tamburojn kaj tamtamojn kaj eksplodigis petardojn. Jen komenciĝis la romantika nupto kaj la feliĉa geedza paro kun granda emocio riverencis antaŭ la patrino la Flava Rivero. ■

Zhu kaj lia novedzino



Vesto-foiro kaj medioprotekto

Teksto kaj fotoj de ZHAO XI


La Ĉina Internacia Vesto-foiro de la jaro 1999 okazis en Pekino. La vestoj, faritaj de 41 junaj fasonistoj el 25 landoj, temantaj pri "ni havas unikan terglobon" atentigis al spektantoj, ke poluo estas minacanta la homaron, kaj la homoj devas protekti sian medion.

Per blanka, griza kaj malhele verda koloroj la fasonistoj aludis la "blankan poluon", "aeran poluon" kaj "ekscesan hakadon de arboj". La unika hela koloro estas bluo, kaj ĝi simbolas la safiran ĉielon kaj donas esperon al la homoj.



"Nuna stato"

"Arbaro"





"Vivo"



"Plasta poluo"
Foto de Li Yuwei



"Blanka estonteco"

"Floro de dianto"

Ekspediciado en valo de Jinsha-


de CHENG WEIDONG

LA tri riveroj Yangzi, Lancang kaj Nujiang paralele fluas en Yunnan-provincon

kaj pli kaj pli proksimiĝas unu al alia. La lokon paralele trafluatan de la tri riveroj ni nomas "Tri-rivera paralelejo". Ĝi estas fama ŝtatnivela pitoreskejo: torentaj

riveroj, kontinua ĉeno da neĝmontoj, prosperaj arbaroj... Tie kuŝas pitoreska Shangrila — Diqing-alt-ebenaĵo, tra kiu fluas la tri riveroj Lancang, Nujiang kaj Jinsha, la supra parto de Yangzi-rivero.

La kanjono de Shangrila



EN LA KANJONO TIGRO-SALTO

Kiam nia vojaĝo por serĉi Shangrila baldaŭ finiĝos, ni venis al la paralelejo de la tri riveroj. Je la unua vido mi estis fascinita de la imponeco de la kanjono Tigro-salto.

La kanjono, 107 km sudoriente de Zhongdian, faras miraklan pejzaĝon sur Jinsha-rivero, kiu en tiu parto estas krampita de la neĝmontoj Yulong kaj Haba. Geologia materialo diras, ke la kanjono formiĝis pro tio, ke Yulong-neĝmonto grandskale altiĝis dum la rivero Jinsha forte malleviĝis. En la centro de la plej mallarĝa parto de la rivero elstaras granda roko pli ol dek metrojn alta, al ĝi la fluo sin ĵetas tondrante. Rakonto diras, ke helpe de la roko tigro transsaltis la kanjonon, tial ĝi ricevis la nomon Tigro-salto. La kanjono, 16 km longa, dividiĝis en tri partojn, nome la supran, mezan kaj malsupran. La diferenco de akvoniveletoj inter la partoj supra kaj malsupra estas 214 metroj, kaj tiu de la marniveletoj inter la kanjono kaj la pinto de la neĝmontoj estas 3 900 metroj.

Ni malsupreniris laŭ ŝtona vojeto, kiu antaŭe estis uzata de karavanoj komercantaj pri teo kaj ĉevalo inter Tibeto kaj landinter-

rivero

no. Survoje ni ja renkontis karavanon. Por iri kiel eble plej proksime al la rivero ni devis malsupreniĝi laŭ rokoj. Mi strikte alteniĝis sur rokoj kaj atente movis mian korpon. Post penado fine mi rajdis sur roko proksima de la roko menciita en la supra alineo. Sub mi ondoj alte levigis tondrante, kvazaŭ la tero tremus. Mi stringis ĝin per la gamboj, kaj la pantalono tute malsekiĝis de akvo. Mia koro forte batis, kaj kun okuloj malfermitaj mi ne kuraĝis movi min. Post kelkaj minutoj mi trankviliĝis kaj elprenis fotilon el mia sako. Kun unu mano firme kaptanta la rokon mi ekfotis per la alia. Mi povis diri, ke ŝajne mi ne fotis, sed spertis spektaklon kun animskua imponeco per mia vivo.

LA UNUA KURBIĜO DE YANGZI-RIVERO

30 km sude de la kanjono Tigro-salto, ĉe la vilaĝo Shasongbi de Zhongdian-gubernio, Jinsharivero mallarĝiĝas kaj mildiĝas. Ĝi abrupte turnas sin en V-formo kaj fluas nordorienten. Tiu parto estas nomata "la unua kurbiĝo de Yangzi-rivero", tio formiĝis pro tio, ke en kvaternaro okazis Alpo-Himalaja-terkrusta movado, la apudrivera urbeto Shigu leviĝis kaj formis monton. Tio alidirektis la riveron Yangzi.

Neatendite, kiam mi vidis la kurbiĝon propraokule, ĝia imponeco ne estis kiel mi imagis.



Karavano ĉe la rivero Jinsha

Loĝantoj diris, ke pli bone oni spektu imponan panoramon en aviadilo. Tio ja ne eblis por mi. Mi do prenis fotilon, grimpis sur la monton, tamen krom verdaj kampoj kaj vasta akvo, nenion mi vidis. Nur brikaj domoj kun nigra tegola tegmento ĉirkaŭitaj de verdaj arboj aspektas antikvecaj kaj idiliaj.


LA KANJONO DE SHANGRILA


Forlasinte la kanjonon Tigro-salto, mi daŭrigis mian vojaĝon al alia kanjono Birang alinome Shangrila-kanjono, kiu situas en Gezan-distrikto de Zhongdian. Nia aŭto portis nin ĉe la enirejon de la kanjono.

Ni piediris en la kanjonon laŭ ŝtoneta vojeto zigzaga apud rivereto. La rivereto estas klara, aŭdiĝis tondro de kunfluiĝo de akvo. Altaj arboj kaj abundaj plantoj ŝirmis kontraŭ la suno. Humideco kaj vento malvarmigis min, la temperaturo estas 4-5°C malpli alta ol ekster la kanjono. Krom tondro de fluo kaj sporada kanto de birdoj, nenio sonas. En fundo de la kanjono, vidiĝas nur mal-

larĝa strio da ĉielo. Tio sentigis al mi, ke homo estas nur guto da akvo de maro. Dum la tuta vojaĝo, ni renkontis neniun. Senhoma regiono ne estas poluciita. Do ni povis senzorge trinki akvon el fonto. Ĝi ja estas pli dolĉa ol minerala akvo.

Sur revena vojo el la kanjono, estas serene. Ni ebriiĝis de la pitoreska pejzaĝo: safira ĉielo, blankaj nuboj, kolorriĉaj floroj sur malproksimaj deklivoj. Ni haltigis la aŭton por registri la belecon per mia fotilo. La unika beleco de la altebenaĵo ja estas malfacile esprimebla per vortoj: inter montoj, bandoj da bovoj kaj ŝafoj promenis sur vasta stepo; sur kampo homoj kantante ĝuas la rikolton; sur deklivoj sunumiĝas ĵus falĉitaj sekalaj garboj; inter montoj ŝvebas ebriigaj dolĉaj kantoj. Tiuj bildoj instigis mian amon al la valo, kaj la pitoreskeco, kvieteco kaj paco tute apartenas al Shangrila en mia kapo. Je la fino de nia vojaĝo, mi ne povas elteni min: mi benas vin, pitoreska Diqing-altebenaĵo — Shangrila de la homaro! Ĉion bonan al vi! ■





1	2	3	4
5			

1. Paštejo sur la altebenajo
2. En granda montaro
3. La supra parto de la rivero Lancang
4. La kanjono Tigro-salto
5. Diqing en aŭtuno

De Schlappner al Houghton (II)

de XIANG HONG

SCHLAPPNER malsukcesis en penado partoprenigi la ĉinan teamon en la mond-pokala piedpilka konkurso, kio disrevigis la ĉinojn. Malgraŭ tio, ke daŭris la diskuto "Ĉu la ĉina teamo devas havi alilandan trejniston?", ĉina trejnisto Qi Wusheng jam komencis peni sur la azia piedpilka ludkampo por partoprenigi siajn piedpilkistojn en la mond-pokala konkurso en Francio. Ankaŭ Qi malsukcesis kiel la eks-ĉeftrejnistoj.

Tiam en la lig-matĉoj de la profesiaj piedpilka kluboj jam viglis pluraj alilandaj trejnistoj, inkl. de la "patro de la moderna piedpilkado de Koreio" kaj eks-ĉeftrejnistoj de la pollanda piedpilka teamo. Tiuj famaj trejnistoj unu post alia venis en Ĉinion kaj inokulis novajn ideojn al la ĉinaj piedpilkistoj. La ĉinoj metis grandan esperon sur ilin kaj iom post iom komprenis, ke por atingi la nivelon de piedpilkado de Eŭropo kaj Sud-Ameriko kaj fine havi forton rivali kun ili, necesas tempo eble de pli ol unu generacio. Ili komprenis, ke eksterlandaj trejnistoj ludos rolon eble nur en mal-longigo de tiu periodo.

Februare de 1997, 26 trejnistoj de ĉinaj profesiaj piedpilka kluboj unuanime elektis Houghton el la multaj kandidatoj, tiel ke li fariĝis ĉeftrejnistoj de la ĉina piedpilka teamo. Tio eble rezultis el liaj brilaj sukcesoj: Li laboris kiel ĉeftrejnistoj de piedpilka kluboj de Svedlando, Anglujo, Kanado kaj Saudi-Arabio, 9-foje sukcesigis la de li trejnatajn teamojn en ĉampionado kaj gvidis iun teamon en la finalon de la Eŭropa Ĉampioneca

Konkurso.

Samkiel Schlappner, ankaŭ Houghton estis ambicia ĉe sia ĉeftrejnistigo: "Post 4 jaroj mi certe gvidos la ĉinan teamon en la finalon de la Mondpokala Piedpilka Konkurso en 2002."

En Azio la ĉefaj rivaloj de Ĉinio estas Koreio, Japanio, Irano kaj Saudi-Arabio. Houghton faris la supran promeson ĉefe pro tio, ke en 2002 Koreio kaj Japanio estos gas-



Houghton kaj ĉinaj piedpilkistoj

tigantoj, tial ili estos nepraj partoprenantoj kaj tiam malpliigos du rivaloj por la ĉina teamo kaj por ĝi la ŝanco estos pli granda. Tamen por Houghton la jara salajro (250 mil pundoj) ja ne estas facile akirebla, ĉar ĉinaj piedpilkistoj estis plurfoje venkitaj en la konkurso kontraŭ malforta teamo pro sia psika malforteco. Houghton estas fama pro sia bona teorio pri piedpilkado kaj nun li, kiel eminenta psikologo, devas sukcese trejni ĉinajn piedpilkistojn.

Houghton plurfoje diris, ke la ĉina teamo estas elstara en Azio. Li ofte laŭdis la piedpilkistojn: "Vi estas bravaj." Pri iliaj mankoj li rimarkigis per mildaj vortoj. Li neniam riproĉis la sportistojn. Li estas koherema, kompare kun la antaŭa ĉeftrejnistoj de la ĉina teamo, kiu ofte ĵetis koleran rigardon.

Houghton instruis al siaj sportistoj ludi pilkon per cerbo, sed ne sole per la piedoj. Li diris, ke oni ne devas fari sin pilka maŝino. Post trejnado li ofte konigis la taktikon al la sportistoj. En la okuloj de la apudstarantoj tio kredeble estas lekcio de profesoro por elementlernejoj, sed Houghton opinias, ke oni devas aldoni al la ludistoj la sciojn, kiuj mankas al ili. La ĉinaj piedpilkistoj, kvankam venkitaj de la usonaj, estas rigardataj kiel la unuaklasaj en la mondo kaj la publiko komentariis, ke ili estas lertaj en uzo de la cerbo. Koncerne la ĉinajn piedpilkistojn, iliaj tekniko kaj fizika forto sendube estas bonaj, tamen ili malofte sukcesas, ĉar ili ne estas lertaj en uzo de la cerbo.

Estas ĝojige, ke eksterlandaj trejnistoj nun ŝanĝas la fizionomion de la ĉina piedpilkado. Nun la lig-matĉoj de la ĉinaj profesiaj piedpilka kluboj estas rigardindaj kaj plie, se ne okazos io neatendita, la unuaj tri teamoj senescepte estos tiuj gvidataj de alilandaj trejnistoj. Ankaŭ Houghton per sia neŝanĝebla ludmaniero "4-4-2" gvidos la ĉinan olimpikan teamon en la kvalifikan konkurson de la azia regiono por la Olimpiaj Ludoj en Sidnejo. Se la ĉina teamo gajnos la unuan lokon de la kategorio, do li estos traktata kiel heroo; se ne, eble anticipi finiĝos lia trejnista vivo en Ĉinio.

Antaŭ nelonge la Centra Televido de Ĉinio teleendis la televidan filmon "Survoje" pri la ĉina piedpilkado. La titolo bone montras la staton de la ĉina piedpilkado. Survoje al venko, pene laboras grupo da homoj, inter kiuj estas Schlappner kaj Houghton. ■

TAMBURADO DE RENQIU

Teksto de WANG JIANGANG
kaj HUANG KUIFANG
Fotoj de LIU SIGONG

RENQIU estas antikva urbo meze de Hebei-provinco. Ĉiujare en la 15-a de la unua monato laŭ la ĉina luna kalendaro, t.e. la Lanterna festo, okazas solena tambura Festivalo. Tiutage en Renqiu kolektiĝas tamburistoj el diversaj lokoj, super la urbeto flirtas koloraj flagoj, ĉie aŭdiĝas tondra tamburado kaj kolektiĝas maro da rigardantoj. En la urbeto regas gaja atmosfero.

Tiu moro aperis antaŭ kelkaj jarcentoj. Jam en la Suda Song-

dinastio (960-1279) sur la batalkampo kontraŭ agresantoj viglis brava heroino Liang Hongyu. Por kuraĝigisian edzon en la batalo kontraŭ la malamikoj ŝi ofte tamburis en la komenco de la batalo. Influante de Liang, la Renqiu-anoj lernis tamburadon kaj poste aplikis ĝin en pli kaj pli multaj aferoj: por celebri la riĉan rikolton, por soleni geedziĝon kaj feston, por peti pluvon de la Ĉielo... Tie la tamburoj estas pezaj kaj grandaj, ĝenerale kun diametro de 2-2.2 metroj. Por movi ĝin estas bezonataj dekelkaj fortaj junuloj. Dek homoj samtempe frapas ĝin ĉirkaŭe. Tradicio diras, ke antaŭe en Renqiu oni povis tamburi en 108 rit-


moj.

Ĉi-jare ni veturis al Renqiu kaj spektis la tiean tamburadon en la 15-a de la unua monato kaj propraokule spertis la imponajn spektaklojn. Ni memoras, ke en la 8-a matene, samtempe ektondris dekoj da tamburegoj. La bruego aŭdiĝis tra la placoj kaj stratoj. La bravaj tamburantoj svingis frapilojn kaj ekdancis la diverskoloraj silkaj kvastoj ligitaj al la frapiloj... El ili estis dekelkaj junuloj en kvadrataj kapvestoj kaj antikvecaj kirasoj. La tamburado de la junuloj sonis kiel fulmotondro, dum la knabinoj frapis modere kaj gracie.

Niajn okulojn frapis kolora standardo kun la vortoj "Vilaĝo



Gajaj Renqiu-anoj



Tamburado

Tianmenkou". Sub la standardo la gvidanto de la tamburantoj Guo fiere diris al ni, ke la tamburado de lia vilaĝo estas la plej eminenta en Renqiu kaj havas plej longan historion. Li diris, ke en lia vilaĝo ĉiuj loĝantoj inkl. de 7-jaraj knaboj kaj pli-ol-80-jaraj maljunuloj estas lertaj en tamburado. Oni diris, ke en la lasta periodo de Qing-dinastio (1644-1911) pro la socia tumulto kaj ekonomia depresio oni ne plu

interesiĝis pri tamburado kaj la vilaĝanoj maltrankviliĝis pri la ebla perdiĝo de la arto de la tamburado, tiam en Tianmenkou aperis homo, kiu vizitis multajn vilaĝojn kaj post 28 jaroj notis 68 ritmojn de tamburado.

En la lastaj jaroj tre viglis la kultura vivo en Renqiu kaj oni disvolvis la tamburadon al 82 ritmoj.



Tamburistinoj

Surbaze de la antaŭaj ritmoj oni pliigis multajn taktojn, dume la tamburantoj ampleksas ne nur virojn, sed ankaŭ virinojn kaj geknabojn. La tamburado estas tre ŝatata de la Renqiu-anoj.

Apenaŭ finis sian parolon s-ro



En tambura festivalo



Irantoj sur stilzoj

Guo, denove leviĝis la bruego de tamburado. Unue aŭdiĝis tri eksplo-daj sonoj kaj sekvis ilin densa salvo da tamburaj bruoj. Starante apud tamburego mi sentis, kvazaŭ la tero ekbatus.

Kiam la prezentado atingis sian kulminon, la diverslokaj teamoj de tamburantoj montris ĉiu sian fortecon. En tondra kriado la tamburantoj frapadis pli kaj pli energie, tiel ke la prezentado ŝanĝiĝis

en konkurson. Intertempe s-ro Wang, estro de la teamo de la vilaĝo Sunjiawu, diris al mi: "Ĉiuj tiuj tamburantoj estas spertaj terkulturistoj. Por la tambura festivalo ili komencas la preparadon ĉiujare tuj post la aŭtuna rikolto kaj ĉi-jare ni aĉetis novajn tamburojn kaj rekvizitojn. Multaj vilaĝanoj sin anoncis por la prezentado. Ĉi-jare 63 homoj de nia vilaĝo venis al la prezentejo, 2-oble pli multe ol en

la pasinta jaro." Li diris plue: "En nia vilaĝo oni aparte ŝatas tamburadon. Ĉe ni la tamburado ne nur simbolas ĝojon, sed ankaŭ ludas la rolon de kohereco. Ĉe ni ĉiuj kadroj kapablas lerte ludi tamburadon, alie ili estas ne tiel prestiĝaj. Krome, la tamburado rolas ankaŭ kiel komunikilo. Por kolekti la vilaĝanojn oni ĉiam tamburas kaj, aŭdinte la bruon de tamburado, oni kolektiĝas pli rapide ol telefone informite." ■

Vizito al Makao (IV)

de ZHANG MEIZHI

TRANKVILE VIVI

Kio ajn grava okazas en Makao, ordinaraj Makaanoj vivas trankvile, ĉar la vivo estas nedisigebla de bagateloj, kiaj manĝo kaj vesto. Mi ricevis tian impreson dum mia vizito al la Makaa Ĝenerala Najbar-Asocio (MĜNA).

MĜNA, simila al la loĝantara komitato en Pekino, prizorgas multajn aferojn, kiaj sekureco de ia loĝkvartalo, interpacigo de najbaroj, kaj okazigo de amuzaj aktivadoj. MĜNA havas almenaŭ du frapantajn flankojn kompare kun tiu en Pekino.

En unu flanko ĝi intertraktas kun la instanco por leĝaj rajtoj de loĝantoj. S-ro Chan Kengjun, ĉefintendanto de MĜNA, diris ke la loĝantoj, kiuj estis transloĝigitaj de sia loĝdomo, rajtas akiri kompenson. Se iliaj interesoj estas damaĝitaj, MĜNA intertraktas kun la instanco aŭ loĝeja komercisto, eĉ sin turnas al proceso por ili. Ĝis nun pli ol 2 000 transloĝigitoj jam akiris kompenson helpe de MĜNA.

En la alia flanko la loĝantoj havas pli multajn bonstatigajn favorojn. Ekzemple MĜNA multflanke servas al maljunuloj, kia fondo de kuracejoj kaj maljunulaj pensionoj kun laborantoj. En

la pensionoj funkciuloj povas per monitoro koni la situacion de apartamentoj por kontroli haladzon kaj trovi malsanajn maljunulojn. En iu pensiono mi vidis kantantajn maljunulojn, inter kiuj troviĝas la 97-jara Pan Qianyu. En sia juneco ŝi estis servistino, kaj nun ŝi vivas kun sia filino en la pensiono. Ĉiumonate ŝi ricevas vivtenan monon de la registaro.



Pan Qianyu sin amuzas per kantado

Kvankam ŝi devas pagi por la apartamento, tamen la lupago estas malalta. En ŝia domo troviĝas kerosena forno, ŝi povas mem prepari manĝon aŭ manĝi en manĝejo por maljunuloj. Simple vestita, ŝi havas bonan humoron kaj kantas energie.

La enspezo de MĜNA venas de socia kontribuo kaj helpo de la registaro. En MĜNA nemalmultaj estas volontuloj. S-ro Chan diris: "Makaanoj estas helpemaj. Lastan jaron, kiam inundo okazis en Yangzi-baseno, Makaanoj malavare donacis monon." Tio montras ĉinan tradicion virton.

HIPODROMO, HAZARDLUDEJO KAJ MUZEO

Makao estas mondfama pro hazardludo. Atinginte Makaon, mi intencis rigardi hazardludon, sed mi legis raporton pri hommortigo pro hazardludo, kio ŝanĝis mian intencon por sekuro.

La enspezo el hazardludo konsistigas 30-50% de la financa enspezo de Makao. Tio havigis al 40 000 homoj vivtenajn rimedojn. Sur stratoj ĉie vidiĝas diversaj reklamoj pri loterio, ekz. vetkuro de ĉevalo. Forlasante Makaon, mi iris al hipodromo, sed tiutage ĝi estis fermita. Same kiel la hipodromo, estas bela ankaŭ la Lisbona Hotelo, fama hazardludejo en Makao. Vesperiĝis. La iluminata hotelo fariĝis unu el la famaj noktaj vidaĵoj. Laŭdire, hazardludon ĉeestas ĉefe turistoj el Hongkong, Taiwan kaj aliaj regionoj. Iuj Hongkong-anoj eĉ veturas al Makao por hazardludo en vespero kaj revenas al sia hejmo la sekvantan matenon. Sed hazardludo ankaŭ kaŭzas problemon de publika sekureco. S-ro Ho Hau-wah, estro de Makao, sin preparas por ordigi hazardludon en Makao cele garantii la sekurecon de la socio.

Kvankam Makao estas malgranda, tamen ĝi havas multe da neforgeseblaj muzeoj, kiel tiuj pri maro, pri konkursaj aŭtoj, pri vino kaj pri historio kaj kulturo. La muzeoj estas gustoplenaj. Ĉiufoje, kiam mi vizitis ilin, mi demandis min: "Ĉu vi multe scias pri Makao?" Ne multe, tre malmulte. Mi volis longe resti en tiuj muzeoj por remaĉi ĉiun eksponaĵon, en kiu estas enkorpigita samsangeco. Pro tempolimigo mi devis adiaŭi Makaon. Se mi havas ion por diri al Makao, tio estas mia elkora dezirego: "Revenu, Makao!" ■


Fremdlandaj folkloroj sur ĉina strato

Teksto de ZHAO XI

Fotoj de LIU SIGONG kaj ZHAO XI

Aŭtune de 1999 Pekino inaŭguris sian rekonstruitan straton Ping'an (Paco-strato) paralelan al Chang'an-strato preter Tian'anmen-pordego. Tiu strato kun lon-

Reporteroj en intensa laboro



Folkloro muzikludo de Aŭstrio



Svisa dancisto disdonas cirkulerojn.

go de 7 km., traŭ la urbon, estas unu el la ĉefaj stratoj en Pekino. Ĉe la inaŭguro oni okazigis sur la strato folkloran prezentadon en naciaj kostumoj, gravan programeron de la Pekina Internacia Turisma kaj Kultura Festivalo. Ĉirkaŭ cent miloj da pekinanoj rigardis la prezentadon daŭranta du horojn.

Dekoj da artistaj grupoj de 34 landoj kaj regionoj faris prezentadon de respektivaj popolaj artoj. Rigardantoj ambaŭflanke de la strato varme aplaudis, kiam preterpasis la virina koruso de Helsinko, la rumana ensemblo, la svisa popola muzik-danca trupo, la danca trupo de Hispanio, la havaĵa danca trupo k.a.

Ĉe la sojlo de la nova jarcento nigruloj, flavuloj kaj blankuloj kolektiĝis en Pekino kaj gaje prikantis la mondpacon kaj belan estontecon.

Srilanka danco "Ves"




Belgaj artistoj sur stilzoj altaj je 4 metroj



Prezentado de Uŝu-o (batalarto de Ĉinio)



Danco akompanata per klakigo de bambuaj stangoj



Popola danco de Norvegio



Folkloro muzikludo de Peruo



Parado en vestoj de Song-dinastio (960-1179)

Solida komplekso por Tibeto

de HU YUN

MI konatiĝis kun s-ro Ye Xingsheng en ekspozicio de tibeta kulturo. Li disponis solan ĉambron en la ekspozicio por siaj eksponaĵoj, kiujn li kolektis dum 35 jaroj en Tibeto. Li diris, ke la eksponaĵoj okupis nur malgandan parton de lia tuta kolekto. Mi devas konfesi, ke mi ne memoris la titolojn, datojn kaj valorojn de ĉiuj kolektaĵoj, sed mi profunde sentis lian solidan komplekson por Tibeto.

Ye Xingsheng ne estas altastatura. Liaj okuloj estas grandaj kaj brilaj. Li parolas rapide kun mieno vigla. Post kelkaj vortoj mi jam estis infektita de

lia vigleco, kaj tute malaperis mia ĝeniĝo pro la unua renkontiĝo. Ju pli ni interparolis, des pli profunde mi sentis lian amon al Tibeto. Li jam komplete kunfandiĝis kun la tero kaj popolo de Tibeto. Li diris, ke li estas han-nacia filo de Tibeto. Havante tian impreson pri li, mi povas eksplicite, kial li dediĉis 38 jarojn kaj tutan havaĵon kaj persistis en fraŭleco por daŭrigi sian kolektadon de antikvaj artaĵoj kaj modernaj kulturaĵoj de Tibeto, kaj fine donacis sian tutan kolekton el pli ol 2 000 pecoj al la nove inaŭgurita Tibeta Muzeo.

En la okuloj de multaj el liaj konatoj li estas kolektisto, sed fakte li estas profesia pentristo. Kiam li estis 13-jara, li venis de sia hejmloko Sichuan al Tibeto, kie laboris liaj gepatroj. De la infaneco li ŝatis pentri, kaj li ofte paŭsis en temploj, post kiam li venis al Tibeto. En templo li akiris poton por fruktoj kiel sian unuan kolektaĵon. Li loĝis unu jaron ĉe maljuna tibetano. Li nomis la maljunulon "patro", kaj la maljunulo nomis lin "filo". Kiam li devis adiaŭi la maljunulon, li multe ĉagreniĝis. Por esprimi sian dankon, li donacis al la maljunulo sakon da faruno kaj botelegon da kuir-oleo, dum la maljunulo al li tre delikatan florvazon faritan de tibeta bakujo.

S-ro Ye Xingsheng diris al mi, ke la maljunulo estas malriĉa, sed honesta. La florvazo ne estas valora kompare kun aliaj objektoj de lia kolekto, sed en ĝi enkorpiĝis la bondeziroj de la maljunulo por li kaj ankaŭ lia sopiro al la maljunulo.

Antaŭ dek jaroj Ye fariĝis profesia belarta laboranto. Dank' al la profesio Ye havis la ŝancon vidi multajn belajn montojn, lagojn, popolajn domojn, antikvajn templojn, preĝmasojn el ŝtonpecoj en sovaĝejo kaj skeletojn de bovoj

Ye Xingsheng



kaj ŝafoj sur stepoj... Li ja ĝuis pli multajn belajn artojn kreitajn de tibetanoj, spertis pli multajn kredojn kaj morojn kaj honestecon kaj grandecon de la tibeta nacio. Li skribis al amiko: "Antaŭ la altaj muroj de templo mi konis la historion de la tibeta nacio pentranta en lamp-lumo. Sur la skafaldoj sennombraj homoj starantaj, genuantaj aŭ kuŝantaj pene pentradis en malforta lumo de olelampoj. Ili pentradis generacio post generacio, ĝis ili pripentris ĉiujn murojn, fostojn kaj trabojn en la pli ol 2 000 temploj de Tibeto. Kaj nur tiam mi komprenis, kial ĉirkaŭ la dio-darmogardisto sur la tibetaj freskoj pendas homaj haŭto, karno kaj koro." Poste li pentris en sia verko "Animo de la Altebenaĵo" bovan kapon, tibetan glavon, ostajn ornamaĵojn, bronzaĵojn, liturgian silkan rubandon kaj striajn plektaĵojn. Tiam en la okuloj de Ye Xingsheng liaj kolektaĵoj jam ne estas simplaj objektoj, sed enhavas la ĉio-ampleksan spiriton kaj animon de la nacio. Li komencis kolekti kun devokonscio kaj amo, ekhavis la sinceran deziron laŭeble pli multe konservi la trezorajn kulturajn heredaĵojn de la nacio.


De tiam Ye Xingsheng absorbiĝis en kolektado. Li diris: "Antaŭe mi diris, ke pentrado estas mia vivo. Sed kiam mi absorbiĝis en kolektado, mi jam pretas oferi mian 'vivon'. Mi forlasis la penikon kaj forvendis miajn pentraĵojn." Ĉiutage li vizitas la plej viglan komercan straton Bakuo en Lhasa, kie li povas trovi multajn bezonaĵojn. La standoj en la strato vendas ĉiutagajn uzaĵojn, ĉiuj irantoj portas sur si tradiciajn ornamaĵojn plenajn de nacia gusto, kaj en butikoj oni hazarde trovas delikatajn ujojn uzitajn de antaŭuloj. La pilgrimantoj al Lhasa portas malnovajn vestojn, sed ili certe havas ĉe si ian "trezoron". Ekzemple Ye kolektis multajn "subportilojn", kiujn la pilgrimantoj portas antaŭ sia brusto. Tia prahistoria ornamaĵo estis farita el metalo, alinomata "fulma fero" aŭ "ĉiela ŝtono". Tibetanoj diigis ĝin, opiniante, ke la povo de dio aliformiĝis en fulmon, enigis en la teron animon kaj faris ercon strangforma, kiu elteriĝis post multaj jaroj. Oni prenas ĝin kiel amuleton gardantan kontraŭ fulmobato kaj herezaĵoj.


Multaj el lia kolekto havas historian kaj artan valoron kaj estas tre utilaj por

koni kaj esplori Tibeton. Iuj el ili montris la kulturen interŝanĝon inter Tibeto kaj aliaj lokoj. En la ekspoziciejo mi vidis fajncan vinkruĉon en formo de fazano. En la historio de Tibeto fazano estis rigardata kiel dia birdo kaj oni kredis, ke trinki el tia kruĉo alportos feliĉon. Sed Ye Xingsheng montris pli fortan intereson al bovlo ne malproksime de la kruĉo. Li diris, ke la valoro de la bovlo kuŝas en tio, ke ĝi montras intermiksiĝon de la kulturo de la nacioj tibeta kaj hana, ĉar la bovlo estis farita en regiono de han-nacio, dum ĝia tegaĵo farita de tibetano.

S-ro Ye Xingsheng havas apartan komprenon pri ĉiuj siaj kolektaĵoj. Antaŭ iu "tanka" (tibet-stila murtapiŝo) li diris, ke ĝi estas religia pentraĵo, tamen bele kadrita per ruĝa, flava kaj blua koloroj. La sorĉaj vortoj kaj signoj estis harmonie dispoziciitaj sur la pentraĵo, kaj la bodisatvoj estis pentritaj laŭ la ĉinstilata pentrarto. Tibet-nacio estas nacio kun forta religia kredo, kaj la kredo forte elspiranta belarton. Inter la kolektaĵoj de s-ro Ye Xingsheng troviĝas sidanta budho kun interkrucitaj kruroj, budho kun du manoj kunmetitaj antaŭ la brusto kaj aliaj du manoj suprenlevitaj, budho kun homa korpo kaj leona kapo rajdanta sur bovo, kaj budho kun leona korpo kaj homa kapo. Ĉu vi ne opinias, ke tiuj idoloj de religia kredo estas sublimaj artaĵoj? Ankaŭ multaj ĉiutagaj uzaĵoj estis artisme faritaj. Ekzemple oni tre ŝatas ornami zonojn per jadaĵo, ostaĵo aŭ bronzaĵo. Ĝuste diris s-ro Ye Xingsheng: "Mi vivis en Tibeto jam 39 jarojn kaj konas multajn homojn ĉi tie. Ili ŝatas belecon, ĝuas kaj kreas ĝin. Ilia plej granda plezuro estas kreo. Tio ja estas la tuto de ilia vivo." El la kolektaĵoj de s-ro Ye Xingsheng mi perceptis la karakteron de tibet-nacio.

S-ro Ye Xingsheng donacis sian kolekton al la muzeo, kaj tuj vakiĝis lia ĉambro antaŭe tiom plena, ke oni eĉ ne povis enŝovi eĉ unu piedon. Kaj ŝajne li perdis la graviton. "Ĉu vi daŭrigos vian kolektadon?" Li ridetis, kaj en tio nerimarkeblas ĉu jesu ĉu nea respondo. Mi pensas, ke li ne povas simple respondi per "jes" aŭ "ne", ĉar lia komplekso por Tibeto ne povas esti solvita per unu aŭ du vortoj. ■






Skribilaro de la 17-19-a jarcento



Fajenca vinkruĉo en formo de fazano farita en la 13-a jarcento



Budhostatuo sur lotusa trono el santala ligno farita en la 18-a jarcento



Fosilio en Himalajo antaŭ 30 milionoj da jaroj



"Tanka" farita en la 18-a jarcento

Kie oni konstruis domon?

de PANG NAIYING

JAM en la antikveco la ĉinoj donis grandan atenton al domkonstruado. Ili opiniis, ke familio prosperas nur tiam, kiam la hejmo situas en konvena loko: se male, ĝi depresias. Ili nomis la hejmon de vivuloj hejmo de *jang* kaj la tombon — hejmo de *jin*. En iliaj okuloj la prospero aŭ depresio de familio dependas de bona aŭ malbona situo de la hejmloko kaj tombo de iliaj antaŭuloj. Tial, ĉiufoje antaŭ dom- kaj tombkonstruado oni petis geomanciiston juĝi la lokon. Jen iom post iom naskiĝis geomanciologio.

SCIOJ MIKSITAJ KUN SUPERSTIĈO

Arkeologoj malkovris, ke antaŭ 8 000 jaroj la ĉinoj jam sciis konstrui domon en alta loko proksime de rivero aŭ lago kaj fari la pordon rigardanta suden. Tiam geomanciologio estis nur simpla kaj praktika determinado de situo de domo. En la skribaĵoj sur besta ostofaritaĵo en la 10-a jc a.K. legiĝas noto pri elekto de loĝloko far loĝantoj por konstrui domon, kaj tiam terdivenado ekhavis koloron de sorĉado. En historia libro pri Tri Regno (220-280) legiĝas jena legendo: Sun Zhong en Wu-prefektujo vivtenis sin per kulturo de melonoj. Iutage tri knaboj petis de li melonojn. Post kiam ili formanĝis la melonojn, iu el ili diris al Sun: "Iru cent paŝojn malsupren de la monto, turnu vin kaj vi vidos, ke kie ni foriros, tie estas trezora terpeco. Se vi konstruos tombon tie, el viaj posteuloj estos imperiestro." Sun faris tion laŭ liaj vortoj kaj lia nepo Sun Quan vere imperiestriĝis.

Eble tio estis hazardo, tamen la ripetado povas diigi la rakonton. Estas multaj similaj rakontoj en la geomanciologiaj verkoj. Oni ja deziris bonan vivon kaj pro tio oni pli kaj pli kredis geomanciologion, opiniante, ke bona loko garantios riĉan vivon, kaj pro tio geomanciistoj estis rigardataj kiel feoj.

En la dinastioj Ming kaj Qing (1368-1911) la kortegoj konstruigis multe da palacoj kaj maŭzoleoj kaj tiam en Ĉinio geomanciologio atingis sian kulminon de disvolviĝo. Tiam oni dividis la homajn laborojn en 9 superajn kategoriojn kaj 9 malsuperajn kategoriojn, kaj geomanciistoj okupis la 4-an lokon de la 9 superaj kategorioj, t.e. post oficistaj konsilistoj, kuracistoj kaj pentristoj. La imponaj Tian'anmenpordego, Imperiestra Palaco kaj 13 Maŭzoleoj de Ming-dinastio en Pekino ĉiuj estis konstruitaj en la lokoj proponitaj de geomanciistoj.

Dank' al disvolviĝo de la moderna civilizacio oni komencis juĝi geomanciologion laŭ sciencaj vidpunktoj. Ĉinaj sciencistoj esploris loĝdomojn, kiujn geomanciistoj rigardis malbonaŭguraj, kaj trovis, ke profunde sub la domoj estas potencaj elektromagnetaj ondoj kaj eĉ aliaj radiaj materioj. Tiamaniere ili malkovris la enigmon, ke la malbonaŭguraj domoj malutilas al la homoj, kaj venis al la konkludo, ke en la historio iuj famaj geomanciistoj havis sciojn pri astronomio, geografio k.a.

Tial iuj okcidentaj fakuloj nomas la ĉinan geomanciologion subscienco. Fakte oni ne povas simple konfirmi tion. Kompreneble nur foriginte la superstiĉajn elementojn el geomanciologio, oni povas tro-

vi la scienca elementon kaŝitan en ĝi kaj precipe tiun de mediologio.

ĈI, VENTO KAJ AKVO EN DOMKONSTRUADO

Por konstrui domon, en la antikveco oni ĉiam elektis lokon, kie kolektiĝas *ĉi* (*Ĉi* havas la signifon de energio, aero, gaso ktp).

Kolektado de *ĉi* estas ĝenerala principo por determinado de situo de domo. Tio estas bazita sur la teorio de la antikva ĉina filozofio pri *ĉi*. Antikvaj ĉinoj opiniis, ke origine en la universo estis nenio, el kiu tamen naskiĝis *ĉi*. La klara *ĉi* leviĝis supren kaj fariĝis ĉielo, dum la malklara malleviĝis suben kaj fariĝis tero. La ĉiela *ĉi* kaj la tera *ĉi* kune nutris la homojn kaj ĉiujn aliajn estaĵojn. Zhuangzi (369-286 a.K.) diris: "La homa vivo ja estas kolektado de *ĉi*. Kolektiĝo de *ĉi* estigas vivon, kaj ĝia disiĝo markas morton." Pro tio geomanciistoj opinias, ke oni bone vivas nur tie, kie kolektiĝas *ĉi*.

En la naturo la vento kaj akvo havas striktan rilaton kun *ĉi*. "Renkontinte venton, *ĉi* disiĝas, kaj renkontinte akvon, ĝi haltas." Tial la loko, kie kolektiĝas *ĉi*, certe estas akvoriĉa.

Sin ŝirmi kontraŭ vento estas utile por la vivo. La nordokcidento de Ĉinio estas ofte atakata de furioza vento kaj konstanta trosekeco, kio kaŭzas polvan ŝtormon. Iom post iom la vento forportis de tie la grundon kaj la oazoj dezertiĝis. El tio vidiĝas, ke vento estas malutila al *ĉi* kaj ankaŭ al akvo.

Ĉi-flanke ankaŭ aero estas rigardata kiel *ĉi*. Ĉiuj bone scias, ke aero kaj akvo estas origino de

ĉiuj vivantoj. Geomanciistoj trovis la interrilaton inter aero kaj akvo: Leviĝinte, aero nubiĝas kaj malleviĝinte, ĝi pluviĝas, sekve oni nomas aeron patrino de akvo kaj akvon filo de aero. Akvo povas vaporiĝi. Kiam vaporo kolektiĝas super akvo, oni ekscias, ke akvo povas kolekti aeron.

“En bona loko ne mankas akvo,” geomanciistoj diras. “Akvo povas esti abunda aŭ malabunda, proksima aŭ malproksima, profunda aŭ malprofunda, kaj tio ne signifas, ke ĉia akvo estas bona.” “Sen akvo malaperas la homa energio kaj kun akvo vigliĝas la homoj.” “En la akvoriĉaj lokoj loĝantoj

riĉiĝas kaj en la akvomankaj lokoj ili malriĉas.” “En la akvoriĉaj lokoj abundas la loĝantoj kaj en la akvomankaj ili malabundas.” Krome, estas bona la akvo zigzaga kaj dom-ĉirkaŭanta.

Sciencistoj opinias, ke tia akvo estas utila por trinkado, irigacio, fiŝado, salfarado kaj ŝipado kaj krome la zigzageco de rivero malrapidigas akvofluan kaj de tio inundo estas evitebla.

Koncerne la akvan kvaliton, geomanciistoj opinias, ke se la fonto proksime de la domo estas bonodora, nesekiĝanta, neinunda, malvarma somere kaj varma vintre, ĝi estas bona fonto, simbolas riĉecon kaj longvivecon. Mi pensas, ke tia fontakvo similas al minerala akvo kun abundo da mikroelementoj. En Ĉinio estas malsanoj, kiaj tiroida dilato, Keshan-malsano kaj naneco, kaŭzita de malutilaj elementoj aŭ manko de iuj mikroelementoj, bezonataj de la homa korpo. El tio vidiĝas, ke la medio de la loĝloko kaj precipe la kvalito de akvo estas gravaj por la homa sano. Historiaj libroj notis, ke en la periodo de Printempo kaj Aŭtuno (722-



Loĝdomoj dorse al monto kaj fronte al akvo

481 a.K.) Wu-regno elektis Suzhou kiel sidejon de sia ĉefurbo ĉefe pro ĝia bonkvalita akvo. La loko estas pitoreska kaj riĉa je fiŝoj, greno, teo kaj silko, tial oni nomas ĝin paradizo en la homa mondo. Ĝuste diris geomanciistoj, ke akvo estas riĉaĵo.

IDEALA LOKO POR LOĜADO

Laŭ geomanciologio la ĉinoj konstruis domon ofte en loko dorse al monto kaj fronte al akvo.

En la okuloj de ĉinaj geomanciistoj la montoj estas drako, favora aŭspicio, ĉar la montoj aspektas kiel ŝanĝiĝema drako. En la antikveco, la plej influhava tribo Zhou originis en la nordokcidento de Ĉinio. Ĝi iom post iom etendiĝis sudorienten. Nordokcidente kuŝas Kunlun-montaro, oni do prenis ĝin kiel prapatron de la montoj kaj certiĝis, ke ĝi naskis tri drakojn, kiuj sin etendis en la centran lokon de Ĉinio. Laŭ ilia etendiĝo oni dividis ilin en tri kategoriojn kaj elektis lokon kun monto proksima al akvo kiel sidejon de loĝdomo. Eble pro tio la ĉemara regiono en sudorienta Ĉinio estas dense loĝata.

Oni ofte elektis bazon de loĝdomo en loko ĉirkaŭita de montoj, ĉar en la okuloj de geomanciistoj la montoj estas efikaj por konservi akvon kaj ŝirmi kontraŭ vento.

Geomanciistoj ofte pririgardis la originon de monto kaj ĝian etendiĝon. Ili rigardis la praan monton nobla kaj opiniis, ke “montoj havas prapatron” estas tiel komprenebla, kiel akvo havas fonton kaj arboj radikon. Kun fora fonto la rivero estas longa kaj kun profundaj radikoj la folioj estas abundaj. Ili diris, ke ŝtonoj estas ostoj de la montoj, tero — ilia karno, akvo — ilia sango kaj herboj — iliaj feloj kaj haroj. La imponaj montoj certe havas skeleton (malmolaj ŝtonoj) kaj firmajn radikojn, dum la maltaj kaj malgrandaj montoj — multe da karno. La modernaj geologoj post esplorado konstatis, ke la montoj formiĝis en longa tempo, ju pli grandaj ili estas, des pli frue ili formiĝis, kaj sekve de tio ilia geologia strukturo estas pli stabila. Por konstrui la hejmon sur firma bazo, antikvaj ĉinoj taksis teron en serĉo de la sidejo, kaj al ili plaĉis nur lokoj kun peza tero. ■



En Regno de Vaksurneo

de LIN WANPING

SIN kaŝante en profunda montaro de Hubei-provinco, meze de Ĉinio, la gubernio Baokang longe restis senfama. Sed nuntempe, kiel la unua rezervejo de sovaĝa vaksurneo (*Chimonanthus praecox*) en la mondo, ĝi altiras grandan atenton de pli kaj pli multaj homoj

per sia granda kvanto da raraj vegetaĵoj. Do, lasu nin ĝui, kun surprizo kaj admiro, la ĉarmon de ĝiaj kvar sezonoj.

ARDECO DE PRINTEMPO


Printempo de Baokang apartenas al peonioj.

En aprilo, kiam burĝonas ĉerizujoj, persikujoj kaj abrikotujoj en

la verda montaro de Baokang, la peonioj jam prospere floras. Ĉ. 100 mil primitivaj kaj sovaĝaj peonioj arope kreskas sur krutaĵoj, en arbaro kaj arbedoj, kun areo de 160 hektaroj. En la suno la blankaj peonioj ĉarmas kiel neĝo; kaj la rozetaj kiel la vizaĝo de ebrieta belulino. La diverskoloraj peonioj, kvazaŭ ĉielruĝo, alportas varmon al la kvietaj montvaloj.

Materialo montras, ke en la mondo estas entute dek specoj da peonioj, el kiuj kvin troveblas en Baokang. Aprile de 1994 itala d-ro Gian Lupo Osti, vicprezidanto de la Internacia Forstokultura Instituto, fakulo de peonioj kaj amiko de la ĉina popolo, kune kun sia germana asistanto s-ro Josh Westrich, venis al Baokang por esplorado. Poste, ili faris jenan konkludon: kun siaj multeco, kolorabundeco kaj virgeco, la sovaĝaj peonioj de Baokang havas gravan valoron por vegetalaj sistematiko, geografio, sinekologio kaj diversaj sciencaj esploroj. Laŭ juĝo la peonioj de Luoyang estas vario de tiuj de Baokang.

D-ro Gian Lupo Osti (la dua de maldekstre) en esplorado en Baokang



ELEGANTECO DE SOMERO

En frua somero, kiam la sovaĝaj peonioj ekvelkis, sovaĝaj lagerstroemioj (*Lagerstroemia indica*) pompe floras.

Lagerstroemio, kiu floras de junio ĝis novembro, apartenas al malalta decidua arbo aŭ arbedo. Ĝi portas abundon da floroj en originala formo. Rigardataj de malproksime, la ruĝaj similas al rozkoloraj nuboj kaj la blankaj al neĝo sur branĉoj de arboj; rigardataj tuj apude, pluraj glumoj pendas sur unu branĉo aŭ kelkaj floroj pompas sur sama glumo.

Laŭ historiaj notoj lagerstroemioj originis de la baseno de Yangzi-rivero, sed alia opinio estas, ke ili kreskas en orienta, centra, suda kaj nordokcidenta Ĉinio. Post plurjara esplorado kaj konsultado de multaj materialoj, s-ro Dai Zhenlin, altklasa inĝeniero de la Baokang-a Forsto-administracio, raportis, ke Baokang estas grava lulilo de lagerstroemioj de Ĉinio kaj eĉ de la mondo.

La sovaĝaj lagerstroemioj en Baokang konsistas el du specioj kaj du varioj kun floroj en malhelruĝa, rozeta, violeta, blanka kaj aliaj tri koloroj. Ĉ. 300 mil lagerstroemioj, el kiuj pli ol 50 mil aĝas pli ol mil jarojn, okupas la areon de pli ol 1 300 hektaroj.

RUĜA KOLORO EN AŬTUNO

Se oni opinias, ke la arbaro estas la plej mistera en la naturo, do taksuso, kiu portas ankaŭ la nomon ora arbo, estas la plej mistera kaj plej valora el la vegetaloj.

En malfrua aŭtuno fruktoj maturiĝis, kaj vegetaloj en arbaroj, sur montoj kaj en valoj ekis velki. En verdaj foliaroj de taksusoj senombraj ruĝaj faboj, kvazaŭ dancantaj fajreroj, brilas en la subiranta

suno.

Pro tio, ke la pinglaj folioj de taksuso forme similas al kombilo, Baokang-anoj nomas taksuson kombilo-arbo. Taksusoj plejparte kreskas en la regionoj de la mezvarma zono kaj la subtropika zono en la norda parto de la terglobo. En la mondo ekzistas 11 specoj da taksusoj, kvar el ili kaj unu subspecio de ili estas en Ĉinio kaj en Baokang troviĝas du specoj. Tie kreskas ĉ. 500 mil taksusoj, kiuj



Taksusaj fruktoj

kovras du mil hektarojn.

Taksuso estas unu el la unuagradaj ĉinaj protektataj plantoj. Taksusa alkoholo ekstraktita el la ŝelo, radiko kaj folio de taksuso servas kiel unu el la plej idealaj drogoj kontraŭ kancero en la mondo. Pro manko de la krudaĵo, la prezo de la drogo estas multe pli alta ol tiu de oro en la internacia merkato, ĉar ĝi estas rigardata kiel

kontraŭkancera drogo kun la plej bela perspektivo de ekspluato en la fino de la kuranta jarcento kaj en la komenco de la venonta jarcento.

FLOROJ POMPAJ EN VINTRO

Foriris aŭtuno kaj venis vintro. Nerimarkite, neĝo jam kovris montojn kaj valojn. En profunda montaro de nordokcidenta Hubei aromas maro de vaksumeploroj pompe florantaj. De tio venis la bela renomo de Baokang Regno de Vaksumeo.

Vaksumeo, unu el la famaj floroj de antikveco, estas rara planto speciala de Ĉinio, precipe la sovaĝaj ĉe pereigo pli kaj pli valoras. En la mondo troviĝas nur du genroj da vaksumeoj, unu estas en Norda Ameriko kaj la alia en Ĉinio. Esploro montras, ke Baokang estas la ĉefa loko de genro de la ĉina vaksumeo.

Miliono da sovaĝaj umearboj de Baokang kreskas sur montoj 200-800 m. super la marnivelo en areo de kvar mil hektaroj, laŭlonge de rivero kun longo de kelkaj centoj da kilometroj, kaj la plej granda umearbaro kovras 133 hektarojn.

Dum esplorado oni eltrovis 110-jaran umearbon kun trunka brusto-diametro de 41.6 cm. kaj alto de 13.5 m. La malkovro kontestis la konkludon de ĉinaj kaj

alilandaj sciencistoj, ke umearbo estas arbedo kun maksimuma alto de kvin metroj.

En 1985 fondiĝis la Rezervejo de Sovaĝa Vaksumeo, kaj samtempe kun tio estis protektataj ankaŭ pli ol 60 specoj da raraj arboj, kiaj ginkoj, rododendroj, metasekvojoj kaj davidioj (*Davidia involucrata*), kiuj kreskas en Baokang. ■

Al kiu verŝi la koron?

Tuj kiam ŝi konsentis eksedziĝi, mi trovis, ke ŝi estas tiu, pri kiu mi plej multe pensas. Mi ĉiam sentas grandan kordoloron rememorante ŝin. Ĉu vi scias, kiun vi neniam forgesos dum la tuta vivo? Mi diru al vi: estas tiu, pro kiu vi pentas.

* * *

Tio devas esti la plej kvieta tempo en mia vivo, nome kiam mi ĝuas konkretan feliĉon pro la konkreta edzeco. Sed tion mi neniam ĝuis poste. Mia koro estis remburita de neesprimebla doloro, kiam mi rememoris la ĝojon, kiu jam fore distancis de mi, kaj la eksedzon, kiun mi vundis per facilanima ofendo... Mi ŝercegis kun mi mem...

— El “Absoluta Privateco”

de XIANG HONG

EN la komenco de la somero de 1998 furoris tra la tuta Ĉinio la libro “Absoluta Privateco”, kiu malkaŝis la embarason de ĉinoj en amo. La libro fariĝis la dua paroltemo en Ĉinio post la inundego okazinta somere de 1998. Dume pli ol 400 gazetoj kaj ĵurnaloj propagandis, reaperigis aŭ komentariis ĝin. Imite al tio, aperis jen kaj jen, tia kaj tia libro pri “privateco”, “privateco” de gefraŭloj, “privateco” de eksteredzeca amaĵo, kvazaŭ la ĉinoj farus sin aperta en unu nokto, ke ĉiuj volontas paradi ĉiajn privatecojn, kiujn ili povis imagi.

Tian situacion neniel atendis Antun, la aŭtorino de la libro “Absoluta Privateco”.

Ŝajne estas necese ekspliki la fonon de la “Absoluta Privateco”.

Kiel raportistino, Antun komencis en aŭgusto de 1995 la “Enketadon pri la kazoj de amaferoj de la modernaj ĉinoj”. Ekde junio de 1997 ŝi aperigadis siajn raportaĵojn en la rubriko “Notoj de Konfesoj” en la formo de dialogo, en la semajnfina eldono de la ĵurnalo “Pekina Junularo”. La rakontoj veraj kaj malfeliĉaj en la semajna rubriko vekis senpreceden-

ABSOLUTE PRIVACY 绝对隐私 当代中国人情感口述实录

安顿/著



中国第一位采访情感隐秘的女记者倾心之作

新世界出版社
NEW WORLD PRESS

La kovrilpaĝo de “Absoluta Privateco”

can ŝaton de la legantoj kaj ĉiuj emociitaj legantoj prenis la rubrikon kiel spegulon por vidi sin mem. Legantoj de malsamaj aĝoj kaj profesioj telefonis al Antun, por ke ŝi intervjuu ilin. Ilia motivo estis simpla: ili nur volis verŝi al Antun aŭ ĉagrenon aŭ penton. Iu el la intervjuitoj diris klare: “Mi turnas min al vi nur por verŝi miajn malagrabraĵojn. Inter mi kaj vi ne estas konflikto pro intereso kaj mi scias, ke vi ne volas nek bezonas ofendi min per miaj konfesoj, sed la proksimuloj ne povas esti tiaj.” Antun kolektis rakontojn de 20 el la 1 500 intervjuitoj kaj eldonis la libron “Absoluta Privateco” kun la permeso de la

rakontantoj, dum ŝia rubriko "Notoj de Konfesoj" daŭre aperas.

Laŭ la difinoj de la vorto "privateco", oni certe miregis pro la apero de la libro malkaŝanta "privatecon" kaj eĉ akcente determinitan per la adjektivo "absoluta". Kompreneble tio estis nur ruzaĵo, kiun la eldonisto artifikis por allogi legantojn kaj fari sensacion. Ŝajne la subtitolo de la libro, "Enketado pri la kazoj de la amaferoj de la modernaj ĉinoj", povas koncize resumi la enhavon de la libro. Granda debito de tia literaturaĵo vekis nian pripenson pri la privateco de la ĉinoj.

Granda sovetunia komponisto Dmitri Shostakovich priskribis en sia rememoraĵo "Atestoj" la vivon en la "komuna loĝejo" dum la epoko de Stalin:

La vivo de la najbaroj estas nekaŝeble videbla, sekve la komentarioj estas facilaj. Ĉio de la najbaroj estas videbla: kiu venis; kiam tiu foriris; kiu vizitis tiun; kiuj estas ties amikoj. Oni eĉ vidas, kion la najbaroj manĝas, ĉar la kuirejo estas komune uzata, kaj kiam li eliras, vi povas enrigardi, kion tiu najbaro kuiras en la potoj...

La vivo sarkasme priskribita de la komponisto estis tiu ankaŭ de plejparto de la ĉinoj. En malvasta spaco oni preskaŭ tute ne povis teni sian privatecon. En la lastaj 20 jaroj, iom pliboniĝis la kondiĉoj por loĝado, kaj parto de la ĉinoj enloĝiĝis en apartamentaj domoj, sed "privateco" restis fremda por multaj ĉinoj. En taksio ŝoforo eble demandas la pasaĝeron: "Kie vi laboras? Kiom da jaroj vi havas? Kiom vi enspezas? Ĉu la loĝejo estas privata aŭ luita?...". Kaj ambaŭ rigardis tian interparolon natura. Kiam du homoj interparolas pri la privata vivo de la tria homo, ili ne

kutimas konsideri, ĉu ilia temo estas deca, ĉu ilia interparolo atencos alies privatecon. Ĝuste pro tio, ke privateco estas publike priparolata, do kiam oni vere malĝojiĝis aŭ embarasiĝis pro amaferoj, ili ne volas verŝi tion al siaj proksimuloj. Multaj homoj profunde kaŝis sian doloron kaj eĉ ĝis la fino de sia vivo.

Antun diris, ke ŝi establis la rubrikon en la ĵurnalo por tiuj homoj, kiuj estas embarasitaj de privateco kaj havas tre multajn ĉagrenojn. Ŝi do volantas ludi la rolon de pastro aŭ psikologia kuracisto por aŭskulti konfeson de pacientoj kaj helpi ilin sin liberigi de la psikologia premo. Iu el la intervjuitoj diris al Antun: "Per la konfeso mi plenumis mian devon por mia pasinteco kaj estonteco. Elverŝinte ĉagrenojn en la pasinteco, mi povos vizaĝi al la estonteco."

S-ino Li Yinhe, sociologo de la Ĉina Akademio de Sociaj Sciencoj, prezentis sian opinion pri la snobo de malkaŝo de "privateco": "Tio pravas, ke en Ĉinio oni bezonas psikologiajn kuracistojn." Eksterlande la homoj verŝas la koron al pastro aŭ psikologia kuracisto. Sed en Ĉinio ne estas tia religia fono nek perfekta medio de psikologia kuraco, kaj tiuj homoj devis sin turni al raportistoj por verŝi la koron, malgraŭ ke ili scias, ke tio ne estas la fina solvo de la problemoj.

Ĉu psikologiaj kuracistoj povos radikale solvi la problemon? Kun drasta ŝanĝiĝo de la socio kaj kresko de konceptoj pri valoro, pli kaj pli multiĝis la ŝanĝeblaj faktoroj en la homa vivo, do kiel gardi la integrecon de la familio kaj kiel vizaĝi al la krizo de amo — eble tio estas la problemoj, kiujn multaj ĉinoj devas alfronti. ■

KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: Du internaciaj respond-kuponoj por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Esp-organizo kaj niaj perantoj ĝuas 50% da rabato. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

*Carlos de Souza, vegetarano, dez. kor. kaj interesiĝas pri nutraĵo, muziko, lingvoj kaj literaturo. Adr.: Praia de Botafogo 316 apt. 1017, Batafogo - Rio de Janeiro, Brazilo.

*Kiu volas komerci sed ne havas komercejon, tio ne gravas, sufiĉas skribi al mi. Mi por vi tion prizorgos. Adreso: Miroslav Majersky, ul. TGM c. 42, 549 01 Nove Mesto n/Met, Ĉeĥio.

*Enilson Arneiro dez. interŝanĝi Tel-kartojn tm. Respondo garantiata. Adr.: Caixa Postal 49, 78600-000-Barra do Garcas - MT, Brazilo.

*Amirouche Haredj, 26-j., dez. kor. t.m. pri turismo. Adr.: Cite Naigelene, No 53. C.P 15000 GK, Tizi. Ouzou, Alĝerio.

*S-ro Jaroslaw A. Fotyga dez. kor. kaj interesiĝas pri skoltismo. Adr.: ul. Harnesio 21/34, PL-20 857 Lublin, Pollando.

*S-ro Alcino Remos Alvez dez. kor. kaj interesiĝas pri reciproka gastigado. Adr.: Est Areies, Bl. B-2-D, S. Pedro Do Estorial, Portugalio.

*S-ro M. Reza Tashakori dez. kor. Adr.: P. O. Box 15875-7351 Tehran, Irano.

*S-ro Jorge Velasques dez. kor.

Adr.: Calle 43 No 88-56, La America-Medellin, Kolombio.

*S-ro Luis Hontes de Oca dez. kor. Adr.: Calle Independancia 186 B, Santo Domingovilla Clara, 530 00 Cuba.

*KOMENCANTO — tre interesa revuo, poŝtkesto 132, Ekaterinburg, 620041, Ruslando.

*Basilio Pessoa Pinto dez. interŝanĝi telefon-kartojn t.m. Respondo garantiata. Adr.: Av. Rio Formoso 79, BR 77470-000 Formoso - To - Brazilo.

*Zhang Daoda, 36-j. instruisto de la angla lingvo, dez. kor. tm. pri instruado (precipe por infanoj), filozofio, turismo kaj aliaj temoj. Adr.: Fujian Minzheng Xuexiao, 198 Lianjiang Lu, CN-350011 Fuzhou, Fujian, Ĉinio.

Pereo de herezo

de WANG HANPING

JULIE de 1999 estis malpermesita en Ĉinio la aktivado de la kontraŭleĝa organizo Falungong (alinome Falun Dafa). Pro tio Falungong kaj ĝia kreinto Li Hongzhi estis multe preparolataj de la publiko. Ankaŭ alilandaj ĵurnaloj raportis pri tio. Kia do estas Falungong?

Mi pensas, ke niaj legantoj antaŭlonge informiĝis pri la profetaĵo, ke en 1999 la homaron atakos plago. Kvankam ankoraŭ ne aperis la fenomeno en la profetaĵo, tamen la diversaj herezoj pretendantaj savi la tutan homaron el la mondfino kaŭzis katastrofojn al la homa socio. Falungong ja estas hereza organizo naskiĝinta en la 90-aj jaroj en Ĉinio. Ĝi asertis, ke baldaŭ venos la mondfino, pereos la homaro, antaŭ tio la modernaj sciencoj estas senpovaj kaj, krom Falungong, neniu registaro kapablas savi la mondon.

En la mondo estas miloj da ĉefherezuloj. Ili ĉiuj pretendis, ke ili estas dioj aŭ transformiĝintoj de profeto, kiu konas la misteron de la universo kaj kapablas savi la homaron. Li Hongzhi ja estas tia homo. Li diris, ke li naskiĝis en 1951, en la sama tago kiel Ŝakjamunio kaj en la aĝo de 8 jaroj li akiris superan magian povon kaj konas la tutan universon, la estintecon kaj estontecon de la homaro. Fakte li naskiĝis en 1952. Samkiel aliaj knaboj, li lernis en lernejo, poste li servis en armeo, laboris en entrepreno kaj, lerninte kelkajn jarojn *ĉigong*-on, li kreis en 1992 Falungong kaj komencis prediki ĝin. Por diigi sin, li faris kunmetitan bildon, en kiu li en stolo sidas sur lotusa trono, kaj ordonis al Falungong-kredantoj pendigi ĝin.

Ĉigong-o estas tradicia ĉina sanprotektata ekzercado. Citinte iom el budhismo kaj *ĉigong*-o, li kreis la vorton Falungong, tamen liaj pens- kaj agmanieroj estas tute kontraŭaj al budhismo kaj *ĉigong*-o. Ĝuste kun tiu mantelo li kaj la de li kreita Falungong trompis milionojn da homoj, el kiuj iuj eĉ finis sian vivon.

Falungong allogis homojn unue per la tiel nomata mirinda efiko en sanprotektado kaj kuracado. Oni bone scias, ke metabolo, naskiĝo kaj morto estas deciditaj de la natura leĝo, sed Falun Dafa asertis, ke oni malsaniĝas pro tio, ke li pekis, kiam li ankoraŭ ne venis en tiun ĉi mondon, kaj tio estas repago. Se oni praktikas Falungong, li mem likvidas la malsanojn kaj kompenzas la pekojn. Pro ekzercoj de Falungong oni ne bezonas kuracilon, tial multaj piaj ekzercantoj rigardis kuracadon en hospitalo malfidela al Falungong kaj rifuzis ĉian medikamenton, kio kaŭzis malbonajn rezultojn. Lastatempe la gazetaro malkaŝis, ke multaj ekzercantoj mortis pro rifuzo de kuracado. S-ino Zhang Yuqin, suferanto de ankilozo de nuka vertebro, kredis, ke majstro Li Hongzhi povas resanigi ŝin, kaj fine ne povis elteni la turmenton kaj sin mortigis. Antaŭ la morto ŝi diris, ke ŝi, demono, malhelpas aliajn en la ekzercado kaj tial ŝi devas foriri al alia mondo.

Li Hongzhi diris, ke oni ne devas viziti kuraciston nek preni medikamenton, sed li mem vizitis kuraciston, prenis medikamenton kaj eĉ estis operaciita je apendicito.

Li pretendis, ke li estas la unika homo kun dia povo, kapabla instali darman radon al ĉiuj ekzercantoj en ilia subventro, kon-

duki ilin al la paradizo kaj alporti utilon ankaŭ al iliaj parencoj, amikoj kaj aliaj proksimuloj. Li trumpetis, ke Falungong-ekzercado povas malfermi al la ekzercantoj la "ĉielan okulon", per kiu ili povas penetri en alian mondon kaj vidi la fenomenojn, kiujn la karnuloj ne vidas. Ĉasante tiun miraklon, multaj ekzercantoj estis atakitaj de psikozo. Du psikozaj hospitaloj de Pekino akceptis multajn psikozulojn de Falungong: En 1996 ili akceptis 9 tiajn malsanulojn, en 1997 — 10, en 1998 — 22 kaj en la unua duonjaro de 1999 — 16. Ma Jianmin, emerita laboristo de olekampo, opiniis, ke en lia ventro estas darma rado kaj per tondilo tranĉis la ventron por serĉi ĝin. Fine li mortis pro serioza vundo. La 18-jara Li Ting opiniis, ke li estas budho kaj liaj gepatroj — demonoj. Li do mortigis ilin. Multaj Falungong-ekzercantoj, dezirantaj atingi la altan gradon en Falun Dafa, sin pendigis, saltis de sur domego aŭ sin dronigis en akvo.

Li Hongzhi substrekis, ke por sin ekzerci oni devas rompi kun aliaj doktrinoj kaj diri kun plena pieco: "Majstro Li tiel diris..." por estigi frenezan personan adoron al li.

La herezo de Li Hongzhi kontraŭ la sciencoj kaj homaro kaŭzis grandan malutilon al la socio. Multaj personoj el la medicina, scienca kaj religia rondoj montris ĝian absurdon kaj malutilon, tamen trompate de liaj tiel nomataj vero, bonfaro kaj toleremo, multaj ekzercantoj dum longa tempo ne sciis sin korekti. Nur kiam la registaro publikigis dekretan, prezentante multajn faktojn en la gazetaro, tiuj ekzercantoj vekiĝis el la inkubosonĝo. ■



Ĉiam serioza en laborado

Malnova presejo kaj ĝia mastro

Teksto kaj fotoj de LI YAN

OKCIDENTE de la Tambura Turo de la antikva urbo Xi'an estas malnova strato borderita de metiejoj, kiuj sin okupas pri farado de flagoj, ŝildoj kaj vizitkartoj.

La strato ekzistas tre longan tempon. Antaŭe tiuj metiejoj estis butikoj kiuj plejparte okupiĝis pri antikvaĵoj kaj skribiloj. Hodiaŭ, maljunulo Zhang Shenchu probable estas la plej veterana metiisto sur la strato kaj lia presejo havas plej longan historion.

En 1934, pro malriĉeco, la 11-jara Zhang Shenchu lernis metion en karto-presejo. Poste li mem funkciigis malgrandan presejon kaj ekvivis la vivon malfacilan. Siatempe li presis per presmetodo tre malnova nenion alian ol fabrikmarkojn por butikoj de silkaĵoj, salo, greno kaj vizitkartojn por iliaj mastroj. En 1980 tipografado anstataŭis la antikvan ŝtonkliŝan presarton. La maljuna metiisto lertis en sia laboro,

tial multaj famuloj petis lin fari al ili vizitkartojn. Kompreneble, la de li faritaj vizitkartoj estas ne tiel delikataj, malgraŭ ke li nomas sian metiejon Delikata Presejo.

Lia presejo prosperis dekojn da jaroj, sed depresiis en la lastaj jaroj, ĉar la aliaj dekoj da presejoj ĉe la strato ekipis sin per komputero kaj nur li daŭre uzas la malnovan ŝtonkliŝan presarton. Do, li perdis, kredble, siajn klientojn.

Zhang Shenchu kaj lia edzino havas kvin gefilojn, el kiuj nur la plej juna filo heredis la metion de la patro. Siatempe, la maljunulo donis al li sian presejon je duono kaj nun la komerco de la filo prosperas dank' al kompostaj sistemoj per komputero kaj granda ideogramo-gravura maŝino regata per komputero, ununura en la strato. Do, la aliaj presejoj ofte petas lin fari tion, kion ili ne povas. La presejoj de la patro kaj la filo staras unu apud la alia, sed ilia komerco kontrastas evidente. En tiu de la filo estas multaj



La edzino estas bona helpanto.



Klientoj akceptataj de Zhang kaj lia edzino

klientoj ĉiutage, sed en tiu de la patro regas silento. En libera tempo la filo ofte vizitas la gepatrojn kaj kelkfoje konsiliĝas kun ili, ke li aĉetos por ili loĝejon proksiman al li por ke ili havu feliĉan maljunecon kaj ke li grandigos sian presejon kaj multigos ekipaĵojn por plivigli la entreprenon. Sed la maljunuloj eksterordinare obstinas en sia opinio kaj ne konsentis cedi al li.


Ili domaĝas la malnovan presejon, ĉar en ĝi ili pasigis duonjarcenton kaj kulturis siajn gefilojn. La miloj kaj miloj da konataj preslitteroj rememorigis al li la pasintecon. En la komenco de la 60-aj jaroj Zhang Shenchu persone plantis cedrelon fingron dikan kaj nuntempe ĝi jam altas kiel trietaĝa domo. Kiel cedrelo, ankaŭ la maljunuloj enradikiĝis tie.



La filo vizitanta siajn gepatrojn en libera tempo



La presejo de la filo ekipita per komputero



Zhang Shenchu


Kvankam ili havas tre malmulte da klientoj, tamen ĉiutage, tuj ĉe la tagiĝo, la maljunulo malfermas la pordon de sia presejo. Balainte la domon, li sidas post la tablo kaj atendas klientojn. Kelkfoje, en la tuta tago estas neniu kliento, li do sin distras per la malnova kliŝa presilo. Tiam en la kvieta presejo aŭdiĝas bruoj. Se venas kliento, la maljuna paro tuj montras siajn fervoron kaj paciencon laŭeble plej grandajn. Menciante presadon, la maljunulo aspektas ĝojplena. Li konas tipojn, matricon, kaligrafian stilon kiel siajn fingrojn. Kompreneble, li bone scias ankaŭ, ke farado de 200 vizitkartoj bezonas almenaŭ 3-4 horojn, pro tio li ofte diras: "Kiel ajn, kliŝa presado ne povas rivali kun tiu per komputero, kiun uzas junuloj." Sur lia vizaĝo legiĝas neniom da malagrabeco, ĉar la afero de lia filo sufiĉe kontentigas lin.

La maljunulo vivas senĝene. Matene li promenas sur la placo antaŭ la Tambura Turo ne malproksime de sia presejo. Li amas florojn kaj malgrandajn bestojn. Hejme li bredas tri katojn, kelkajn kokinojn kaj akvarion da orfiŝoj, kiuj plievidentigas la vivecon de lia hejmo. ■

URBOMUROJ KAJ PORDEGOJ DE PEKINO

En la antikva Ĉinio ĉiuj urboj havis murojn kaj pordegojn, sekve de tio la urbomuroj estis fundamenta marko de la antikvaj ĉinaj urboj.

Pekino estis ĉefurbo de la dinastioj Liao, Jin, Yuan, Ming kaj Qing. La nuna Pekino estis konstruita surbaze de tiu de Ming-di-



Ekstera urbomuro de Pekino

nastio (1368-1644). La formo de ĝiaj kvartaloj estas unika. Rigardate de supre, Pekino aspektas kiel granda ŝaktabulo kun interkrucitaj stratoj sur si. Akvo en la ĉirkaŭfosaĵoj brilas interne kaj ekstere de la muroj.

La muroj ekstera kaj interna longas entute 36 km., altaj averaĝe 11 m. kaj dikaj 14 m. supre. Post ĉiu centoj da m. troviĝas apogpilaŝtro sur la ekstera flanko de la muro.

9 pordegoj estis sur la interna muro kaj 7 sur la ekstera. Imponaj turoj majestas sur pordegoj de la urbomuroj interna kaj ekstera, ĉe kiuj estis ankaŭ solida embrasurhava citadelo, la plej alta loko en la antikva urbo. Bedaŭrinde, granda parto de tiuj turoj kaj muroj malkonstruiĝis en la 50-60-aj jaroj.

Nur 3 turoj bone konserviĝas kaj ofte ripariĝas. Inter ili la angula turo de la sudorienta urbomuro aspektas kiel ĝia origino.

Nun en Pekino estas nur 3 partoj de la urbomuroj longaj entute

ĉ. 400 m., el kiuj la unua ĉe la Antikva Observatorio sude de Jian-guomen estas plej bone konservata. La dua estas ĉe la sudorienta angula turo de Ming-dinastio kaj la tria estas okcidente de tiu turo.

SUKCESE KLONITA EMBRION DE GRANDA PANDO

Nun ekbrilis espero por granda pando elliberiĝi el perejo. Antaŭ nelonge ĉinaj sciencistoj sukcese klonis embrion de granda pando.

Gvidate de Chen Dayuan, sciencisto de la Zoologia Instituto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj, la esplorgrupo injektis soma-

toĉelon de granda pando en senkernigitan ovolan ĉelon de leporo,

kaj tiamaniere ili kulturis fruperiodan embrion de granda pando. Ili publikigis la rezulton sur la aŭtoritata gazeto "Ĉinaj Sciencoj". Tio signifas, ke oni sukcese solvis la unuan ŝlosilan problemon por kloni grandan pandon. Ja estos peninde savi pereontajn bestojn per tiu metodo.

Chen Dayuan prezentis sian proponon en marto 1997 kaj ricevis subtenon de la Ĉina Akademio de Sciencoj.

GRIMPADO SUR LA PLEJ ALT-AJN MONTOJN DE LA SEP KONTINENTOJ

En junio 1999 ĉinaj alpistoj Li Zhixin kaj Wang Yongfeng sukcese grimpis sur Jaya, la plej altan montpinton de Oceanio, kaj realigis sian deziron grimpri sur la plej altajn montojn de la sep kontinentoj. El tiaj sukcesintoj la unua estis kanada alpisto, kiu plenumis sian grimpadon en 1986. Ĝis 1997 realigis tiun celon 41 alpistoj.

En 1984 Li Zhixin kaj Wang Yongfeng, kiuj studis en aliternejo, suriris tiun vojon kaj en 1988 ili partoprenis la nord-sudan transiran grimpadon de Qomolangma. Li Zhixin grimpis norde kaj atingis la pinton, dum Wang Yongfeng sude kaj atingis la lokon 8 050 m. altan.

Poste ili aliĝis al ĉina-usona ekspedicio kaj atingis Vinson, la plej altan montpinton de Antarkto.

En 1992 ili kune atingis McKinley, la plej altan montpinton de Norda Ameriko.

En 1993 Wang Yongfeng surgrimpis Qomolangma. Li malaperis 28 horojn ĉe la malsupreniĝo, ĉar

Li Zhixin kaj Wang Yongfeng sur Elbrus



li renversite pendigis sur glacia muro 8 700 m. super la marnivelo.

Ili atingis Aconagua, la plej altan montpinton de Suda Ameriko en 1995. En 1997 ili surgrimpis Elbrus de Eŭropo, kaj en 1998 Kilimanĝaron de Afriko.

En la 23-a de junio 1999 ili atingis la plej altan insulan montpinton Jaya, 5030 m. super la marnivelo, en Nov-Gvineo en la tropika zono. Jen ili fariĝis la unuaj ĉinoj surgrimpintaj la plej altajn montpintojn de la sep kontinentoj.

ANTIKVAJ BAMBUAJ SLIPOJ REVENIS HEJMEN

La Ŝanhaja Muzeo ordigis la disigitajn bambuajn slipojn de la



La angula turo de la sudorienta urbomuro de Pekino

periodo Militantaj Regnoj (475-221 a.K.) aĉetitajn en bazaro de historiaj objektoj en Hongkong 4 jarojn antaŭe. Pli ol dek el ili nun ekspoziciigis en la muzeo.

Sur la bambuaj slipoj estas ĉ. 35 000 ideogramoj. La plej longa slipo estas 57.1 cm. kaj la plej mallonga 24.6 cm. Ili koncernas la enhavojn de konfuceanismo, taoismo, militarto kaj aliaj. Jam perdiĝis multaj antikvaj libroj menciitaj sur la bambuaj slipoj. Ĉi tiuj do ludas gravan rolon en studo pri la historio, kulturo kaj politiko de la periodo Militantaj Regnoj. Iuj eĉ kompletigos kaj revizios la blankon de la studo.

Profesoro Zhang Guangyu de la Hongkong-a Ĉinlingva Universitato trovis en Hongkong la slipojn elterigitajn en Jiangling kaj Jingmen de Hubei-provinco kaj telegrafis al la direktoro de la Ŝanhaja Muzeo. Post granda penado la bambuaj slipoj revenis hejmen.

Kontribuajoj petataj por la konkurso "50 jaroj por EPĈ"

Esperanto 50 jaroj por Paco Ĉinio

En majo 2000 la redakcio de "El Popola Ĉinio" festos sian 50-jaran jubileon. En duonjarcento la revuo EPĈ, la E-movado en Ĉinio kaj la tuta mondo spertis grandajn ŝanĝiĝojn. Vi, spertanto de la 50 jaroj, certe havas ion por verki, por diri al la aliaj. Pro tio ni lanĉos konkurson "50 jaroj por EPĈ" kaj sincere petas vian kontribuojn.

Vi povas verki kun tre ampleksa temo, rilate al EPĈ — Esperanto, Paco kaj Ĉinio. Ekz. viaj esperantista sperto, opinio pri E-movado kaj paco, amikaj kontaktoj kun alilandanoj, impresoj pri kaj rilato kun Ĉinio kaj la revuo EPĈ...

Viaj kontribuajoj povas esti en ajna stilo kaj ajna formo. Estas tre bonvenaj koncernaj fotoj kaj portreto de la aŭtoro por ilustrati artikolon.

La kontribuajoj venu al nia redakcio antaŭ la 30-a de aprilo 2000.

Ni aljuĝos premiojn al la kontribuantoj. La premiitoj ricevos ĉinajn metiartaĵojn, E-librojn kaj unu-jaran abonon de EPĈ. Ĉiu kontribuanto ricevos donaceton.

Ni publikigos elstarajn kontribuojn en la rubriko "50 jaroj — EPĈ". La rezulto de la konkurso legeblas en la julia numero de EPĈ 2000. Dum la 85-a UK en Tel Aviv de Israelo ni anoncos la rezulton kaj disdonos la premiojn.

La Red.



En la loko de Dong-nacianoj




Al foirejo

Paŝtado

Fotoj de LIN SUNXING

Inter Guizhou, Guangxi kaj Hunan en sudokcidenta Ĉinio estas loko, kie loĝas Dong-nacianoj. La loko estas tre bela pro la montoj kaj riveroj. En mateno la montoj estas vualitaj de nebulo, kaj diafane konturiĝas la tamburaj turoj, surfostaj domoj kaj koridoraj pontoj. La homoj aŭ kondukas bovojn, aŭ pelas ŝafojn, aŭ iras al kamplaboro. Tie ne nur la pejzaĝo estas pitoreska, sed ankaŭ la domoj pentrindaj, la dancoj viglaj, la vestoj buntaj kaj la homoj gajhumoraj. Ĉi tiuj fotoj montras al vi la belajn scenojn de la loko.





Dong-nacia vilaĝo en printempo

Reveno



Ĉe vendejo de metiartaĵoj



Ventumado

Pri buŝa higieno

de CAO WEN

LA buŝa higieno estas grava por preventi karion, periodentiton kaj aliajn dentajn malsanojn. Se la kavoj kaj sulkoj sur la dentoj estas malpuraj pro restintaj manĝaĵoj, tio facile kaŭzas karion. Konstanta broso de la dentoj estas tre utila por la denta higieno kaj homa sano, ĉar ĉe la maljunuloj la salivaj glandoj iagrade malfortiĝas kaj de tio malpliĝas ilia salivo, malfortiĝas ankaŭ la efiko de buŝa melpurigo. Sen atenta dentobrosado la restaĵoj de manĝaĵoj restas en la dentaj fendoj, kie kreskas bakterioj. Tio kondukas ne nur al stomatologiaj malsanoj, sed ankaŭ al pusa parotidito.

Dentobrosado ja estas simpla afero, tamen oni devas fari ĝin atenteme.

Oni devas brosi siajn dentojn matene post ellitiĝo kaj vespere antaŭ enlitiĝo, kaj la vespera broso estas pli grava, ĉar post la tuta tago en la dentaj fendoj kaj kavoj certe restas multe da manĝaĵaj pecetoj. Se oni ne forigas ĉi tiujn, bakterioj facile kreskas en la buŝo kaj en dormado oni ne plu maĉas,

nek parolas kaj de tio malpliĝas la salivo en la buŝo, kio kaŭzas bonajn kondiĉojn por kresko de bakterioj, laktacidaj baciloj kaj streptokokoj. Ili povas fermentigi la hidrokarbidojn kaj estigi acidon, kiu povas solvi kalcion de la dentoj, moligi kaj kariigi la dentojn kaj eĉ kaŭzi periodentiton.

Ĉiuj scias, ke ne dece brosi la dentojn horizontale, ĉar tiamaniere oni povas detrui kaj atrofii gingivon, ne povas purigi la dentofendojn kaj pro tio facile detruigis kojnodentoj kaj mueldentoj, dum vertikala broso povas ne nur purigi la dentofendojn kaj kavojn, sed ankaŭ masaĝi gingivon, akceli la sangocirkuladon de la gingivo kaj plifortigi la organismon de dentoj kaj dentoperferio. Malgraŭ ĉio ĉi tio, iuj kutime brosas la dentojn horizontale. Tion oni nepre devas korekti.

Diversaj bakterioj facile vivas sur dentaj kalkuluso, tial oni devas teni la dentojn en konstanta puro. Kiam formiĝas kalkuluso, oni devas forigi ilin en hospitalo. Tion oni devas fari unu fojon duonjare.

Kiam falas dento, oni devas enmeti la dentan protezon move-

blan aŭ fiksan kiel eble plej frue. Tio estas utila ne nur al parolo, sed ankaŭ al manĝado, digestado kaj prevento de kario, gingivito, gingiva atrofio kaj periodentito.

Kun medicina progreso kaj disvolviĝo de la medicinaj materialoj rapide disvolviĝas ankaŭ la tekniko planti dentan protezon. Tiu tekniko estas utila al la homoj, al kiuj mankas dentoj, ĉar kun plantita dento oni facile manĝas samkiel per la veraj dentoj.

Fine mi konigas al vi, niaj karaj legantoj, la dentoprotektajn rimedojn:

I. Dentoklakigo: Faru dentoklakigon 30-foje matene post ellitiĝo kaj tiom da fojoj vespere antaŭ enlitiĝo. Faru tion kompare forte.

II. Kirliĝo de la lango en la buŝo: Per la lango masaĝu la lipojn, supran makzelon, dentojn kaj gingivon. Faru tion unufoje ĉiutage 5-10 minutojn. Post kiam en la buŝo abundiĝas salivo, englutu ĝin 3-foje.

III. Gargarado: Sen akvo faru gargaradon, kaj pro tio produktiĝas salivo. Englutu la salivon 3-foje. Tio ludas la rolon same kiel masaĝo de la dentoj. Faru tion unufoje ĉiutage 3 minutojn. ■

Ruĝdoma Songô

“Ruĝdoma Songô” eldonita de la Ĉina Esperanto-Eldonejo estas unu el la plej famaj klasikaj romanoj de Ĉinio, kiu priskribas la ruiniĝon de iu nobela familio en la lasta periodo de la ĉina feŭda socio kaj la tragedion de juna amanta paro. La romano prezentas la dekadencan de la ĉina feŭda socio

kaj ĝiajn diversajn konfliktojn.

La romano estas vaste konata en Ĉinio, kiel verkoj de L. Tolstoj en Rusio kaj la dramoj de Ŝekspiro en Britio. La Esperanta versio de “Ruĝdoma Songô” estas en tri volumoj.

Volumo I

1995. 582 p. 15x21 cm. Ilus. Bind.

Prezo: 22.00 USD

Sendokosto: 5.00 USD

Volumo II

1996. 793 p. 15x21 cm. Ilus. Bind.

Prezo: 28.00 USD

Sendokosto: 5.00 USD

Volumo III

1997. 627 p. 15x21 cm. Ilus. Bind.

Prezo: 26.00 USD

Sendokosto: 5.00 USD

Mendu ĉe:

- Distribua Fakoj de EPĈ
- Libroservo de UEA
- Nia peranto en via lando



Aucma Grupo

La Aucma Grupo, starigita en la Ekonomia kaj Teknika Disvolva Distrikto de Qingdao estas granda unuaklasa entrepreno de Ĉinio kaj ĉefa entrepreno (grupo) de Shandong-provinco, havanta fakojn de scienco, industrio, komerco kaj financo kaj produktanta hejmajn elektrajn aparatojn, kiuj enviciĝis inter la avangardaj samspecaj produktaĵoj de Ĉinio. Kun devizo "Por kiel eble plej bonaj produktaĵoj", la Aucma Grupo faris efikan reformadon, ellaboris rigoran laborsistemon kaj evoluis kiel eble plej rapide. La Aucma Grupo estis honorita per la titoloj "Fama marko de Ĉinio", "La reĝo de ĉinaj glaciaj ŝrankoj", "La unua ŝatata marko por ĉinaj familioj" kaj "Floro de la ĉina nacia ekonomio". Kiel la ĉina aŭtoritata departemento pri markoj taksis en 1997, la marko Aucma valoras 3.406 miliardojn da juanoj, kaj la palpebla kaj nepalpebla aktivoj de la Aucma Grupo superis 6.7 miliardojn da juanoj.


La Aucma Grupo praktikas modernan sistemon de entrepreno, faras perfektan administradon kaj havas serion da kulturaj sistemoj de entrepreno. La Aucma Grupo produktas hejmajn elektrajn aparatojn de 19 kategorioj, 62 specoj, 183 serioj kaj pli ol 700 tipoj. Ĝi jam disvolviĝis en ampleksan grupon produktantan hejmajn elektrajn aparatojn.



La fabriko de Aucma Grupo



La Aucma Grupo estas produktanto de glaciaj ŝrankoj por la kompanioj Coca-Cola kaj Pepsi-Cola, unika en Azio.





Antaŭurbo de Pekino en aŭtuno

Foto de ZHANG YAO

ISSN 0032-4361



9 770032 436009

世界语《中国报道》一九九九年第十一期
(本刊代号: 二一九一五) 国内统一刊号: CNI 1339/G2